Bô Yin Râ

LA LIBRO PRI LA HOMO

Bô Yin Râ estas la spirita nomo de
Joseph Anton Schneiderfranken (1876 – 1943)

El la Germana originalo
(„Das Buch vom Menschen“)
tradukis A. Rehfeldt (http://www.a-rehfeldt.de)

© 1928
ĉe Kober Verlag Bern, Svislando

Enkonduko

„Vi devas deiri de la *homo* por atingi „Dion“, alie „Dio“ eterne restos por vi – *fremdulo*. –“

Tion mi skribis en la *„Libro pri la Reĝa Arto“*.

Mi ne konas pli bonan vorton por komenci hodiaŭ tiun ĉi *„Libron pri la Homo“*...

Kune kun la *„Libro pri la Vivanta Dio“* kaj la *„Libro pri la Transa Mondo“*, la *„Libro pri la Homo“* formu *trilogion*, ĉar, kvankam ĉiu unuopa el tiuj tri libroj estas kompleta en si mem kaj formas memstaran tuton, ĉiuj estas interne ligitaj, kaj ekzistas en ili multaj teksteroj eksplikantaj sin reciproke.

Tiu reciproka eksplikado povas nur *profundigi* la influon de la vortoj sur la *animon*.

Do ankaŭ la *„Libro pri la Homo“* venu en la manojn de tiuj, kiuj jam konas la aliajn du librojn.

Ĝi atingu la korojn de tiuj, kiuj bezonas ĝin: la animojn, kiuj estas pretaj enpreni ĝian enhavon.

Kvankam mi scias pri la multaj ebloj de miskompreno, kiujn tiaj vortoj bedaŭrinde povas renkonti, mi tamen devas diri eksplicite, ke ankaŭ tiu ĉi libro estis skribata por plenumi devon prenitan sur min, en plena akordo kun la „plejaĝuloj“ de la spirita unuiĝo, al kiu mi apartenas kaj al kiu mi ŝuldas ĉion, kion mi havas por doni.

La instruo tie ĉi perata estas la jarmilaĝa heredaĵo de tiuj, al kiuj ekde la pratempo de la tera homaro estas konfidita por ĉiama gardado la sankta flamo, kies lumo eliras el la plej interna „pralumo“.

Ni nur transdonas tion, kion ni mem *ricevis*, *por ke* ĝi *atingu* per ni la homojn vivantajn kun ni kaj vivontajn post ni.

Ni ne pretendas esti *la aŭtoroj* de tiu ĉi instruo.

Krome, temas malpli pri „instruo“ ol pri *komunikado* de praktika *sperto* en la vivanta mondo de la *substanca eterna spirito*, mondo, el kiu originas ĉiu homa animo sur tiu ĉi planedo ...

Do ankaŭ ĉi tiu libro, temanta pri la *„homo“*, gvidos en la mondon de la pura substanca *spirito*. –

Tio eble aperos al multaj kiel memkontraŭdiraĵo, ĉar ili ankoraŭ ne ekkonis, ke la reala *homo* estas tiel same *„frukto de amo“* el io vira kaj io virina *en la substanca pura spirito*, kiel lia tera animala korpo originis el *korpa* erotika unuiĝo de viro kaj virino *sur la tero* ...

Sed kiu volas percepti la *homon* kaj do lerni *ekkoni sin mem*, tiu devas iri en la *hejmlandon* de la homo, – devas direkti sian serĉadon al *tiuj* vojoj, sur kiuj povas esti grimpe atingata la *alta regiono*, el kiu originas la *eterna* organismo de la reala homo, organismo neniam perceptebla per teraj sensoj, kaj ekkonebla ankaŭ al la tera *intelekto* nur en la *efikoj* de spirite estigitaj impulsoj.

Tiom longe, kiom ni okupiĝas pri *la tera fenomena formo de l' homo sur tiu ĉi tero*, ni staras vidalvide sole al *animalo* de malharmonia naturo, – *malharmonia*, ĉar ĝi provas sperti sin mem ne nur kiel *animalon*, sed evidente ricevas impulsojn por spertado ankaŭ el fortoj ne apartenantaj al la fortoj de l' animalo, – *malharmonia*, ĉar tiuj fortoj fremdaj al la animalo efektive *malhelpas*, ke ĝi povas plene ĝui sian ekzistadon, nepremate de kulpo, kun animala sento de agrableco.

Tial oni devas antaŭ ĉio ekkoni kaj venki la eraron, ke *la homo* estas nur la fenomena formo, por kiu ni *sur tiu ĉi tero* uzas la nomon „homo".

Oni tute ne povas ofendiĝi, se iu „kiu konas la homojn" havas, pri la altaj vortoj nomantaj la homon *„bildo de Dio"*, nur ironian rideton, tiom longe, kiom la nocio, kiun li ligas kun la vorto „homo", celas nur la *surteran homon*...

Vere: la vorto pri „la bildo de Dio" estus plej ridinda malsaĝo, se tiu parolinta ĝin unuafoje estus pensinta *nur* pri la „homo" *de la tero*. –

Tiu vorto povis esti dirata nur de malsaĝulo, – aŭ de vera saĝulo, al kiu estis malfermiĝinta la ekkono de la *ĉion ampleksanta* naturo de la homo. – – –

Kion la nocio *„homo"* devas enteni, por ke ĝi vere ampleksu la homon kaj ne nur *unu* el liaj sennombraj *fe-*

nomenaj formoj en la spirita kaj la fiziksense perceptebla kosmo, tion tiu ĉi „libro pri la homo“ diros al vi.

Mi supozas, ke vi *ne* plu ridetos pri la vorto de l’ saĝulo, kiam vi ekkonis en vi mem tion, kion mi havas por diri al vi…

Tiam vi komprenos, kion signifas la malnova sanktigita frazo: *„Laŭ la bildo de Dio lin kreis la Elohim.“*

Tiam vi certe serĉos la *„prahomon“* ne plu *sur tiu ĉi planedo*, – ekkonos, ke tio, kion vi ĝis nun *nomis* prahomo, estu pli ĝuste nomata *animalo de la pratempo*, el kiu evoluis la pli *subtila* animalo, kiu nuntempe servas al la *homo* kiel portanto kaj instrumento, por ke li povu sperti sin mem en la fizika mondo. –

Vi ankaŭ ne plu „*malesperos* pri la homo“, ĉar ĉio, kio ĝis nun ŝajnis al vi *„malestiminda“*, *„malalta“* kaj *„mizera“* je la estaĵo nomata „homo“ sur la tero, fariĝos komprenebla al vi kiel natura, ĉar *laŭanimala* efiko de la *tera animalo*, kiun tie ĉi la vera „homo“ penas *uzi* kiel instrumenton por memmanifestiĝo, – sed kiu ofte faras pli fortan reziston al li, ol li kapablas superi en la regno de la fizika mondo.

Aliajn aferojn vi lernos kompreni kiel neeviteblan *„fenomenon de frotado“* en la interagado de tiom diferencaj fortoj.

Krome, vi neniam plu revos pri „ĉielo sur la tero“, ĉar vi estos ekkoninta, ke eĉ ne la animalo, kiu fariĝu servanto al la homo en tiu ĉi materia mondo, povus trovi tie ĉi sian „ĉielon“, – sed ke la vera *„homo“* jam *havis* sian ĉie-

lon, antaŭ ol li faligis sin mem en la regnon de fizika manifestiĝo, kie la „homa animalo“ devas prezenti al li siajn fortojn, se li trovu sian vojon returne al tiu ĉielo...

Bone estas al vi, se, leginte la sekvantajn traktaĵojn, vi venas al la *ekkono*, ke ankaŭ vi estas *homo el la eterna hejmlando de la homo*, kaj ne nur la pli alta *animalo*, al kiu vi trovas vin tiom intime ligita, ke eble ĝis nun vi ne ekkonis ĝin kiel ion al vi fremdan kaj kontraŭagantan. – –

Bone estas al vi, se vi tiam levas vin per via tuta forto, kaj en la estonteco strebas nur al *tio via plej alta*, – ĉar jam tro longe vi trafosis viajn ŝlimajn malaltaĵojn, tro longe vi metis viajn manojn en la necertaĵon de marĉaj abismoj, sen povi tie trovi tion, kion ili kredis palpebla. –

Mi volas vidi vin *plena de konfido al vi mem.*

Vi ne plu povos *malestimi* vin mem, tuj kiam vi – eĉ se nur *iomete* – eksentas, ke estas malestiminda je vi nenio alia ol tio, kion *vi mem faras* malestiminda al vi per *erara interpretado*. – – –

Ekde tiu tago vi ne plu *amikece kuniĝos kun tio malalta*. –

Ekde tiu tago vi ne plu *strebos al tio via malalta*. –

Vi fariĝos *„ribelanto“*, kiu sin tiras *supren* el la glueca argilo de la eluzitaj vojoj de l’ ĉiutageco.

Liberapaŝe vi supreniros sur la rokvojo kondukanta vin al la firnoj de viaj montopintoj.

Tie vi renkontos *vin mem, kiel „homon“ en la hejmlando de l’ homo*. – – –

La mistero: „viro kaj virino“

En la eterna prafundo: en la *spirito* eterne generanta sin mem kaj, en si, ĉion estantan, – profunde kaŝita en la fonto de ĉiu estado kaj manifestiĝo, – kuŝas la mistero *„viro kaj virino“*...

Por konstrui ponton al terhoma komprenkapablo, oni parolas pri la „pura spirito“ nomante ĝin *„absoluta esto“*, kvankam tia, eterne ripozanta „absoluta esto“, en si persistanta por si sola, neniam *estis*, ne *estas*, nek iam ekzisti *povus*.

Kiu egaligas tiun helpan nocion al la *realo*, tiu tro multe fidis sian *pensadon* kaj estas ankoraŭ malproksima de la ekkono, ke pensa konkludado neniam sukcesos iri pli foren ol ĝis la limo de la imagoj ankoraŭ *submetitaj* al la leĝoj, al kiuj la pensado devas obei. –

Sed la realo de la pura spirito estas „leĝo“ *al si mem*, kaj ĝi restas neatingebla por ĉiuj logikaj konkludoj. – –

En si ampleksante sin mem, la *„pura spirito“* estas *kreanta sin mem* de eterne ĝis eterne, – sin mem *generanta* kaj *naskanta*, – ĉar la pura spirito estas: *„viro kaj virino“*. –

El la prae donita memmanifestiĝo, *„viro kaj virino“ en la spirito* generas kaj naskas *plue* – senkomence – senfine – *la homon* de la pura spirito. Kaj ili generas kaj naskas tiun homon, „laŭ sia propra bildo“, kiel *„viron kaj*

virinon“, – kiel *unuecan estaĵon, laŭ tiu prae donita, dupolusa naturo...*

Ĉio, kio iam fariĝis fenomeno: – ĉiuj sunoj kaj mondoj de la *spirita* kosmo kaj de la *fiziksense* perceptebla kosmo, *ĉio, ĉio fenomena* estas „kreitaĵo“ de tiu el la spirito generita, *pure spirita* „homo“, kaj tiu kreitaĵo estas do ankaŭ atesto de *„viro kaj virino“* en la eterna spirito. –

En senlima nombro, – en infinitobla individuiĝo, – tiu ĉi unua „homo“ de l’ pura spirito estas generata kaj naskata el viro kaj virino en la spirito, kaj *ĉiu unuopa* estas *eterne kreanta:* – en si eterne generanta kaj naskanta, – ĉar li *„estas“* nur tiom, kiom li *manifestas sin* en eterna generado kaj naskado, kiel vira kaj virina fortoj, unuigitaj en dupolusa formo.

Tio, kion li generas kaj naskas, estas „li mem“, estas esto el lia esto, sed en formo kvazaŭ „pli densa“, malpli riĉa je lumo, ĝis fine, jam fore malproksimiĝinta de la praesto post multoble plua generado, li generas sin mem en difinita spirita „denseco“ kiel *„fenomenon“*, naskante el si mem ĉiujn mondojn, kiuj sin manifestas kiel fenomenojn.

Infinitobla estas ankaŭ la „fenomeno“ de la homo de la eterneco *en lia fenomena kreitaĵo*, kaj ĉiu individua fenomena manifestaĵo kiu eliras de li, plue generas kaj naskas la sekvantan *pli malaltan* specon de fenomeno.

En la *spirita* kosmo, kaj eĉ en la kosmo de *fiziksense* percepteblaj mondoj, ekzistas formoj de la „homo“, kiuj

aperus al la homo de *tiu ĉi tero* – se li kapablus percepti ilin – pli altaj ol dio...

Unu el la *plej malaltaj* ŝtupoj de la fenomeno de l' „homo“ estas la tera homo.

En li, la pragenerita homo de la pura spirito ligis sin al unu el la *plej malliberaj* estaĵoj de sia fenomena kreitaĵaro: – al la fenomeno de l' *animalo*.

Tie ĉi, en la animalo de la tero, la homo de la spirito perdis la konscion *pri si mem* kaj nun sentas sin mem nur en la vibrado de teraj ĉeloj per la konscio de la pli subtila animalo, konscio kiu per malmultaj malfortaj radioj el la vera homeco en la spirito ankoraŭ ricevas tiun lumigon, kiu levas la terhoman memsentadon super la konscion de aliaj teraj animaloj.

La „homo“ estus *perdiĝinta* en la animalo, se ne estus portita post li sur la teron lia heredaĵo el la prae donita generado, tiel ke *povas* esti donata al li la forto por enpreni en sin la lumantan, tute el lumo formitan kristalon de la pura *spirito*, kiun li tiam trovas en si mem kiel *„sian Dion“*.

Kiel putisto ne malascendas en la profundon de l' ŝakto sen sekure fiksi je firma loko la ŝnuregon, kiu rekonduku lin al la lumo, tiel ankaŭ la homo de la spirito ne malascendis en sian fenomenan kreitaĵaron sen la ĉiama sekurado de sia plugenerado per la „arĝenta fadeno“ de radiantaj fortoj el sia unua generado en la pura spirito.

Nur per la fortoj, kiuj sekve de tiu ligo ankoraŭ atingas lin surtere de sur plej altaj altaĵoj, estas eble al la tera homo *unuigi* sin en si mem al sia Dio kaj, en li, lukte levi sin el malhelo kaj nokto al lumo kaj lumado. –

Sciante pri sia alta sekurigo, post kiam *lia Dio* „naskiĝis“ en li, li nun povas sendanĝere riski malascendi en la plej profundajn abismojn, kien lia tera sorto eble sendas lin…

Sed ankoraŭ la plej multaj teraj homoj vivas en la homanimalo de la tero *sen* Dio, eĉ se ili servas al reve imagita ekstermonda dio.

Ankoraŭ ili serĉas siajn praulojn *nur sur tiu ĉi planedo*, scias nenion pri tio, ke *la tuta universo* estas la regno de l' homo, ne scias, ke la „pratempaj homoj“, kies spuroj estas ankoraŭ trovataj sur la tero, estas nur iliaj teraj *„patrinaj“* prauloj, dum iliaj *„patraj“* prauloj, – la *„fekundiga“* elemento – estas troveblaj sole nur en la regno de la *spirito*.

La liberigo de la spirita homo el la memforĝitaj katenoj ligantaj lin kiel teran homon estas ebla nur, se li finfine ekkonas sin kiel nur *unu* el la miloblaj *fenomenaj formoj* de la „homo“, kaj ekkonscias la eraron, ke li *sole tia, kia li trovas sin sur la malgranda tero*, estas la vera „homo“, la *sola* manifestiĝa formo de la homo.–

La vortoj de sanktaj libroj pratempaj estas la pereigo de tiuj kiuj kredas je ili, tiom longe, kiom la homo de la

tero rilatigas ĉion, kio estas dirita en tiuj ĉi atestoj de ekkonintoj pri la „homo“, nur al *si sola:* – nur al la fenomena formo de la homo sur tiu ĉi tero. –

Supren li devas direkti sian rigardon, – sed ne al ekstermonda dio, kiun li reve imagas al si alte super la nuboj, sed „supren“ al *si mem* en siaj *pli altaj* fenomenaj formoj, – „supren“ al sia origino, la pura *spirito*, kiu volas denove kristaligi sin en li mem kiel *„lian Dion“*! –

Sed ankaŭ sian veran *„vivantan“* Dion la tera homo povas trovi nur malfacile, ĉar li alkutimiĝis al tio, ke li imagas sian Dion nur kiel *„viron“*, dum lia „vivanta Dio“ estas *„viro kaj virino“*. –

Liberigo venas al la tera homo nur, se ankaŭ la *„virino“* en lia Dio ree parolas al lia konscio ...

„L' Eterne Virina tiras nin sor*.“ – –

Ke li vidas nur *„viron“* en sia reve imagita dio, estas *kulpo*, estas forturniĝo disde la fortoj de praa esto: – implikiĝo en tio *virina, koncipon deziranta* en lia naturo, – fordonado de tio *vira, aktiva* en li mem. –

Malharmonio necese estiĝas ĉie, kie „io vira“ kaj „io virina“ en la kosmo agas ne *en unuiĝo*.

Vi povas senhezite nomi „viron kaj virinon“ ankaŭ per *aliaj nomoj*.

Estas ĉiam la du *kontraŭaj polusoj*, kiuj en sia unuiĝo rezultigas *vivon*.

---

*) supren

Pozitiva kaj negativa, aktiva kaj pasiva, generi kaj naski, doni kaj ricevi, elpuŝi kaj entiri, movi kaj esti movata ...

Kaj ĉio ĉi interligiĝas en eterna ciclo, same kiel la tera virino fariĝas patrino de l' viro, kaj la viro: patro de la virino. –

Kaj ekzistas *neniu* formitaĵo, *neniu* estaĵo en la spirita aŭ en la fiziksensa kosmo: – ankaŭ nenio ŝajne „pure vira" aŭ „pure virina", – en kiu aŭ kio ne samtempe troviĝas „viro *kaj* virino", kvankam en miloble diferenca kunmiksaĵo.

Eĉ ĉiu *„atomo"* necese „disfalus en nenion", se „viro kaj virino" ne efikus en ĝi ĉiam generante kaj naskante.

Per kiu ajn nomo la esploranta homo *nomas* la fortojn malkovritajn de li en la plej malgrandaj partikloj de la „materio" – ĉiam temas pri formoj de la eterne ekzistantaj fortoj „viraj kaj virinaj".–

Sed ankaŭ vian „vivantan" Dion vi povas esperi trovi en vi nur tiam, se vi serĉas lin en vi kiel tian, kia ĝi *sole* estas trovebla: – kiel „viron *kaj* virinon", kaj nur tiam, kiam vi sentante „serĉas" lin tiumaniere, li povos en vi mem naski sin el „viro kaj virino", formante tiun el lumo konsistantan „kristalon", kiu tiam *unuigas* la du polusojn de via propra esto en *sia* dupolusa esenco. –

Alta helpo el via spirita hejmlando estas prezentata al vi, se vi serĉas tiumaniere ...

Sur tiu ĉi tero vivas nevideble Unu, kiu *estas* tia kia li *estis:* – unu el la patra pra-generado, el la patrina nasko

en la pura spirito, – *spirita homo el la pura, plej alta esto en la eterna fontofundo de Dia, spirita vivo.*

Unu el tiuj, kiujn *„viro kaj virino“ en la spirito* generas kaj naskas *„laŭ sia bildo“.–*

Sed vivas ankaŭ aliaj nevideblaj „homoj“ sur tiu ĉi planedo: „homoj“ *generitaj* de la prageneritoj, – „ligitaj“ al sia propra fenomena kreitaĵaro en la nevidebla regno, sed tamen restantaj en „la alta lumado“, *ne* „falintaj“ el lumo kaj lumado kiel la *videbla* tera homo.

Vidante la profundan mizeron de la homo en la tera fenomena formo, ili penas savi lin, tuj kiam li vere *volas* lasi savi sin.

Sed ili mem agas sub la spirita gvidado de *tiu unu nevidebla prageneritо*, kiu direktas ĉion spiritan sur tiu ĉi planedo.

Ĉiam, kaj ĉiam denove, tiu nevidebla spirita rondo de helpantoj trovis, sub plej alta spirithoma gvidado, novajn terajn homojn en la vivo, kiujn ĝi povis fari instrumentoj de sia arda helpvolo, – agantaj majstroj de plej alta teraspirita ekkonado: kunhelpantoj de sia helpa laboro, – ĉar ili jam antaŭ sia tera enkarniĝo estis proponintaj sin por kunhelpo.

Trans tiu ĉi ponto, kiu estas nepre necesa por atingi la serĉantojn palpe vagantajn en la mallumo de tiu ĉi tero, paŝis kaj paŝas en ĉiuj tempoj la eterna vera „homo“, prageneritа en la spirito, al la falinta homo plue generita en la formo plej malproksima de la lumo: la tera homo – ser-

ĉante tiujn, kiujn li povas *levi* kaj rekonduki en la lumon.– –

Ke tiom multaj el la teraj homoj estas *serĉantoj*, sed ke tiom malmultaj fariĝas *trovintoj*, havas jenan kaŭzon: preskaŭ ĉiuj serĉantoj serĉas *en la malĝusta direkto* kaj tiel venas pli kaj pli profunden en mallumon ...

Ĉiu forto efikas en *tiu* direkto, *en kiu ĝi estis sendata.*

Sed la tera homo, en kiu la *„animalo“* portanta lin gajnis superecon, tiel ke li rigardas tion teranimalan en si kiel sian esencan, eĉ kiel sin mem, nun serĉas *ekster* si tion, kion li povus trovi nur *en* si, kie la ligo kun la pli altaj ŝtupoj de sia homeco restas ĉiam ekzistanta per la „arĝenta fadeno“ de radiantaj fortoj, kiu ankaŭ tion, kio vere estas „homo“ en la *tera homo*, tenas ligita *kun ĉiu homa esto en la spirito*.

Ankaŭ neniu helpanto el *spiritaj* regionoj, kaj neniu el tiuj, kiuj kiel „majstroj“ de spirita ekkonado vivas *videble sur la tero* por servi kiel „ponto“ al la vera „homo“ de la eterneco, povas atingi la teran homon en la kerno de lia konscio en *alia* maniero ol *el lia interno*, en kiu sola troviĝas *tio vere homa*.

Nur *preparante* oni povas kvazaŭ „alparoli“ tion vere homan en la tera homo *ankaŭ el la nevidebla ekstera regiono*, por ke ĝi vekiĝu por interna instruado kaj heligo.

Do ĉiu serĉado devas esti direktata *internen*, se ĝi konduku al *trovado!*

Ne en tibetaj monaĥejoj, ne ĉe la sanktaj lokoj de la hindoj, ne en sekretaj rondoj de laŭdiraj „sciantoj“ estas atingebla la „granda iluminiĝo“, la „budho-fariĝo“, sed nur en la plej profunda soleco kun si mem, – kun la vera „homo“ en la propra koro ...

Neniu el la treege malmultaj sur tiu ĉi tero, kiuj estis farataj majstroj de l’ spirita ekkonado por alporti helpon al iliaj kunhomoj, povas atingi vin, eĉ se li starus apud vi, se via konscio ne vekiĝas en la sola loko, kie vi povas ekkonscii vian homecon.

Nun mi volas plue paroli al vi kiel al homo, kiu tion, kion mi ĝis nun diris al vi, volonte enprenis en sin.

Ĉu vi nun volas atingi en vi la „homon“ de pli alta fenomena formo per tio vere homa kaŝita en vi? –

Ĉu vi do volas iri, ŝtupo post ŝtupo, supren kaj returne al via propra origino en la pura spirito? –

Ĉu vi do estas certa, ke vi ne nur *aŭdis* miajn parolojn kiel oni aŭdas strangan fabelon, sed volas honeste kaj per ĉiuj fortoj *agi* laŭ miaj vortoj? – –

Tiam do aŭskultu plu, kion mi nun diras al vi:

La *„homo“* generita el la spirito, – generita kaj naskita el „viro kaj virino“ en la spirito, – estas *„viro kaj virino“*, kiel vi jam aŭdis.

Sur ĉiuj siaj ŝtupoj malsupren al la tera homo, la spirita homo de la eterneco povos renkonti vin nur *kiel „viro kaj virino“*, kaj nur en tiu dupolusa unuiĝo vi trovos lin,

tuj kiam vi mem estis trovata en la spirita regno, kiel unu, kiu kapablas trovi.

Ankaŭ la majstro de plej pura spirita ekkonado, kiun oni tiam sendas al vi, por ke li spirite fariĝu via gvidanto kaj helpanto, kvankam vi ne konas lin, ne vidas lin, kaj scias pri li nur *en nova sentado*, estas: – *„viro kaj virino“*, ĉar tio, kio sola povas atingi vin el li, estas la *eterna* homo, kiu en li, la tera homo, releviĝis el la tombo. –

Se vi serĉas la lumon, vi sciu, ke via vojo estas gardata de la majstroj de la eterna tago, al kiu ĉio malluma en vi devas cedi!

Sed vi ankaŭ sciu, *kiuj* tiuj majstroj vere *estas* kaj *kie* vi *povas* atingi ilin, ĉar ne en la ekstero kaj ne de ekstere estas atingebla por vi *tio*, kio vivas en ili por helpi vin. –

Ne ilia ekstera persono en la mondo de fiziksensa perceptado povas doni al vi la helpon, kiun vi bezonas.

Ne serĉu ilin en la regiono de la *nokto de neekkonado*, kie la pli subtila animalo, tie ĉi servanta al la „homo“ kiel vehiklo, eraras siamaniere kaj prenas ŝajnon por realo, – malesperante kaj turmentate de duboj.

Tie ĉi vi ĝis nun ĉiam serĉis kaj *ne* trovis...

Vi nun devos serĉi en *alia*, al vi ankoraŭ *nekonata* loko ...

Dum vi vivas tie ĉi en la tera korpo, vi neniam akiros veran klarecon pri vi mem, antaŭ ol vi trovis en vi *la „homon“ de praeterna generado.* –

Sed vi ne povas trovi lin, sen supreniri ŝtupo post ŝtupo la *„ĉielan eskalon“*, kies plej malsuprajn rungojn for-

mas *teraj homoj*, en kiuj tamen *la pura homo de la spirito* jam estas mastro kaj reĝo. –

Vane vi serĉos en „sanktaj libroj“ finan klarecon, ĉar tiuj libroj iam estis skribataj nur por tiuj homoj, kiuj jam estis lukte akirintaj finan klarecon, kaj celis prezenti al ili nur gvidadon sur ilia plua vivvojo.

En tiaj libroj la majstro parolas al disĉiplo, kiu jam estas *interligita* kun li en la plej interna interno, kaj al kiu li povas riveli sin per bone konataj vortoj plenaj de simbola signifo.

Sed kiam vi estos *trovinta* en via *interno* – en via eterna homo – tion, kion vi hodiaŭ ankoraŭ serĉas, tiam multaj tekstoj de la pratempo komencos paroli al vi en komprenebla, klara lingvo, kaj *nur tiam* la „sanktaj libroj“ estos vere utilaj ankaŭ al vi. –

Sed *nun* vi unue serĉu *nur en vi mem!*

Antaŭ ĉio vi devas komenci per tio, ke, kiam vi diras *„mi“* al vi mem, vi vokas *ne* plu nur *la pli subtilan animalon*, sed *la eternan* „homon“.

„Viron *kaj* virinon“ vi devas serĉi en ĉio kio estas *en* vi kaj kio estas *super* vi. –

Indiferente, ĉu vi estas viro aŭ virino, – ĉiam sciu, ke *antaŭ eterneco* vi *difinis* vian polusecon, kaj ke tiu polusa difiniteco eterne ne plu povas ŝanĝiĝi, – sed ĉiam postulas en si *sian kontraŭpoluson*. –

Tio via spirite vira ne devas voli subpremi *tion spirite virinan* en vi, same kiel *tio via spirite virina* ne devas nei *tion spirite viran* en vi.

Nur tiuokaze vi iam estos reunuigata en la spirito kun via pradonita kontraŭpoluso, formante la saman spiritan unuiĝon, kiu ligis vin kaj vian kontraŭpoluson en unueco, antaŭ ol devis okazi la disigo rezulte de la „falo“ el alta lumado ...

Serĉu *en ĝusta maniero*, tiel kiel mi tie ĉi instruas vin serĉi, kaj vi iam trovos *vin mem* kiel la *„homon de la eterneco“*.

En li, – *en vi*, – vi ascendos, tra ĉiuj interŝtupoj, unuigita kun via „vivanta“ Dio, en la originan staton de via pragenerita *esto*, apartigita disde via konscio nur per via propra volo: – *esto* generita el *spirito* kaj naskita en la *spirito*, – *eterne vivante „el viro kaj virino“ en la spirito.*– – –

Ne ĉiu tera homo atingas, jam dum tiu ĉi vivo en la *animala korpo*, la *konscion* en la mondo de la pura, substanca *spirito*.

Nur *tre malmultaj* fariĝas plene konsciaj en la spirita regiono de la tero dum sia surtera vivo.

Sed *ĉiuj* homoj povas trovi en si mem sian *eternan* vivon *jam dum siaj surteraj tagoj*.

Ĉiuj homoj *devos* iam lerni trovi en si tiun *eternan* vivon, eĉ se ili *ankoraŭ ne* estis trovintaj ĝin ĉe sia forpaso el la ekstera tera mondo. – –

Vi ne povas iam fariĝi konscia en la pura spirito, antaŭ ol vi vivas en vi en via *eterna* vivo.

Nur en via *eterna* vivo vi povas sperti *vin mem* kiel *homon de la eterneco*. –

Celas ankaŭ vin la sanktigita vorto de l' alta majstro:

„Estu do perfektaj, kiel ankaŭ via ĉiela Patro estas perfekta.“

Sed ne tio, kio je vi apartenas nur al *la tero*, povas iam atingi tiun ĉi „perfektecon“.

Nur tiam, kiam vi trovis en vi vian *eternan* vivon kaj vivas *en ĝi*, vi estos *„perfekta“* kiel la *„Patro“*, kiu estas *„en la ĉielo“*, *kiel eterna generanto en la patrina sino de eterna naskado:* – praforto en la praesto, – samtempe *„viro“* kaj *„virino“*. – – –

Antaŭ ol vi *atingis* tion, kio tie ĉi estas atingebla, neniu el viaj tagoj pasu sen almenaŭ *via strebado* al tiu celo.

La vojo de la virino

En tiu *plej alta* sfero de la *spirita* fenomena mondo, kie la spirita homo unuafoje generis sin mem kiel *fenomenon* – sed ankoraŭ kiel *spiritan* fenomenon – , „viro“ kaj „virino“ ankoraŭ estas intime *unuigitaj* en la pradonita unueco de dupolusa „mi“-sentado.

Sed ĉe ĉiu nova plugenerado, la spiritaj mondoj, en kiujn tiu unua *spirita* homa emanaĵo plue generas sin, fariĝas kvazaŭ „pli densaj“ kaj malpli riĉaj je origine donita „lumo“, – sed ĉiam *restas* ankoraŭ la plej intima unueco de „viro kaj virino“ en komuna dupolusa memsentado.

Fine alveninte al sia kvazaŭ *„plej densa“ spirita* fenomena formo, – nur malforte lumigate de la origine donita „lumo“, – la spirita homo de tiuj ĉi regionoj, tiom malproksimaj de la sfero de lia unua generado, unuafoje ekkonas la mondojn de *fizika* formiĝado.

Sed tie ĉi okazas, ke kaptas la *virinan* poluson en li nova sento: – la *timo*.

Timo antaŭ la gigantaj fortoj, al kiuj la unueca dupolusa homo spirita ĝis nun ordonis, sed kiujn li nun vidas agantaj en nova maniero al li tiom fremda, ke li tie ĉi ne plu kuraĝas ordoni, kaj sekve perdas sian potencon ...

Sed *malantaŭ* la agado de la fortoj kiuj nun ŝajnas al li *minacaj*, li perceptas *novan mondon*, kun vivantaj estaĵoj, kiuj originas el lia propra forto en *plej alta* spirita esto: –

la mondon de *fizik*sensa perceptado, de la fenomenaro spertanta sin en *fizika* formo.

Timo antaŭ la fortoj ne plu mastreblaj, kaj *altiro* eliranta el la *formoj* de la fizika mondo, fine igas la *virinan* poluson de la spirita fenomena homo rompi, per *vola ago*, la muron kiu ĝis nun apartigis ĝin de la fizika kosmo.

Neeviteble superfortas la virinan poluson la nove trovita eblo sperti sin mem en maniero nekonita, kaj ektremante pro deziregо ĝi tiras sin for el sia ĝisnuna fenomena formo kaj unuigas sin kun la animalo de la tero, – ne aliamaniere ol fulmo eltiriĝas el nubo por unuigi sin kun la tero. –

Sennombraj „teroj“ ekzistas en la kosma spaco, sur kiuj la spirita homo devas tiumaniere sperti sin en animala korpo: – la fizika korpo de la animalo, kies restaĵojn oni ankoraŭ trovas sur tiu ĉi planedo, el tempoj kiam ĝi *ankoraŭ ne* portis en si la *spiritan homon*, kvankam nuntempe oni eble nomas ĝin „prahomo“. –

La fortiriĝo el la *spirita* fenomena mondo kaj la ekliĝiĝo al la animala korpo signifas, ke la „falo“ el la alta lumado estas definitive kaj plene okazinta.

La spirita homo, kiu antaŭe estis „viro“ *kaj* „virino“, – unuigitaj en la sama „mi“-sentado kaj ĉiam plu generantaj sin en aliajn spiritajn mondojn, – sekve nun estas *disduigita*, ĉar en la *fizika* mondo la polusoj „viro“ kaj „virino“ *neeviteble apartiĝas* unu de la alia, tial ke tiu ĉi mondo havas sian ekzistadon nur pro la konstanta *„tensio“* rezultanta el la *disigiteco* de la du pradonitaj polusoj.

Komence la *virina* poluso de la spirita fenomena homo kaŭzas tiun ĉi „falon“ kaj deziregas la ekzistadon en la animala formo, – sed en spiritaj regnoj povas resti nenio, en kio efektiviĝus *nur unu* el la du polusoj „viro“ kaj „virino“, kaj tial la vira poluso devas tuj *sekvi* la „falon“.

La *animala formo*, kiun la virina poluso tuj trovas post sia „falo“ – formo „kreita“ de spiritaj homoj de plej frua generado, – *devigas* la viran polusón deziregi por si la saman formon.

„Tiam la filoj de la dioj vidis la filinojn de la tero, ke ili estas belaj; kaj ili prenis al si edzinojn el ĉiuj, kiujn ili elektis.“

(La *filinoj* de la *„dioj“* tie ĉi jam estas fariĝintaj „filinoj de la tero“. – La *filoj* de la dioj sekvas. – –)

Proksimume tiel oni povas priskribi en terhoma lingvaĵo la eterne denove okazanta proceso, kiu ligas la homon de la *spirita* fenomena mondo al la formaro de la *fiziksense* perceptebla mondo.

Okazas nenio alia ol *volita ŝanĝo de la perceptomaniero*, ŝanĝo volita unue de la virina poluso kaj tuj *disiganta* la antaŭe unuigitajn polusojn, *apartigante* ilin en virinan polusón ekzistantan por si mem kaj en viran polusón same ekzistantan por si mem, – adaptite al la seksa disigo de la terhoma animalo, kiu povas konservi sian specion nur en tiu disigo.

Laŭ la legendo pri la paradizo, „Eva“ estas delogata de „la serpento“ kaj poste delogas „Adamon“. Eĉ se tiu

legendo, tia kia ni konas ĝin, eble ne estas transdonita al ni en la origina formo, ĝi tamen ankoraŭ klare montras, ke tie ĉi homo de alta ekkonado volis tradicii al la posteularo, – kiom tiu ĉi povos kompreni lian simbolan lingvaĵon, – sian scion pri eterne denove okazanta proceso, en formo simbole vualita en tempe difinita raporto.

Kiu scias legi en la vortoj de tiu scianto, tiu ankaŭ ekkonos, ke la vortoj, kiujn laŭ la saĝulo la „Eternulo“ diris al „Adam“ kaj al „Eva“, indikas la pluan *sekvon* por „viro“ kaj „virino“, vortoj, per kiuj la *sekvo* de la kulpo estas dividata laŭ tre signife diferenca mezuro.

En la ĉiutempe okazanta proceso de la „falo“ – en ĉiu unuopa okazo – la laŭnature pasiva *„virina“* poluso la unua subfalas al la „prakulpo“ pro *timo*, la unua subfalas al la *altiraj fortoj* de la fizika mondo.

Sed la vira poluso tute ne estas libera de kulpo, eble estante nur la „viktimo“ de sia unuiĝo kun la virina poluso.

La „kulpo“ de la *„vira“* poluso estas *la rezignado pri aktiva rezisto* en la dupolusa komuna vivo, dum la virina poluso estas minacata de timo kaj altiro.

Tiel okazas, ke la du polusoj interŝangas siajn rolojn: – spirita perversio, en kiu la *virina* poluso prenas *aktivan*, sed la *vira pasivan* teniĝon, kio faras la „falon“ en la *fizikan* mondon neevitebla.

Sed *decida* estas sole la pozitiva *voloago* en la virina poluso. –

Tial, en la legendo pri la „prapeko“, okazas la *„malbeno“*, kiu falas sur la homaron en la „virino“, – kiu antaŭdiras al la surtera virino dolorojn, timojn kaj mizerojn, kiujn la fizika animala korpo ne povas eviti, kaj la konstantan batalon kun la irize brilanta „serpento“ de la *fizikksensa* perceptomaniero.

Sed al la „viro“ estas senvalorigata nur *tiu ĉi perceptomaniero mem* per la malbeno falinta sur ĝin.

Al li estas antaŭdirataj *la penoj kaj suferoj*, al kiuj la ekzistado en la sfero de fiziksensa perceptado estas katenita.

Tial en la legendo la „Eternulo“ plue diras al la „virino“ en la homo:

„Al via *viro* vi vin tiros, kaj li *regos super vi*.“

Kiom ofte tiu ĉi vorto estis *misuzata* kiel privilegia permeso por subpremi virinan individuecon surbaze de la absoluta regpovo laŭsupoze koncedita al la *viro* en la *edzeco* per tiu ĉi vorto!

Sed ankaŭ ĉiu ridetanta aŭ indigna *mokado* ne povas malaperigi la grandan *veron*, kiun tiu scianto kredis esti sufiĉe emfazita nur per tio, ke li igis la „Eternulon“ ordone paroli tiel al la viro kaj la virino. –

Tie ĉi vere estas trovebla *io alia*, ol pensis tiuj, kiuj provis legi el tiu ĉi nur milde vualita vero – bonvenan dian konfirmon de la rajtoj de vira avideco je potenco super la virino.

Tie ĉi estas montrita la vojo al estonta *reunuiĝo* de la du surtere disigitaj polusoj en la regno de la *spirito*, reu-

nuiĝo, kiu povas okazi nur per *malfaro* de la spirita perversio de la polusoj, kiu estis antaŭkondiĉo por la „falo“.

Tie ĉi estas atentigite pri la spirita leĝo, kiu povas fari uzon *nur* de la *viro* sur tiu ĉi tero, kiam ĝi bezonas homajn antenojn por fari la „ĝojigan mesaĝon“ de la *homo de la eterneco* denove perceptebla al la *tera homo* erarvaganta en la „mallumo“, kaj alkonduki al li la fortojn, kiujn li bezonas por sia reveno en la „lumon“.

Viro kaj virino en tiu ĉi fizika mondo ankoraŭ havas en si la lastajn spurojn de la iama *interligiteco* de la polusoj.

En la virino de tiu ĉi tero ankoraŭ vivas kvazaŭ „memoro“ pri tio, ke ŝi pasintece trovis sian „mi“ ankaŭ en la „viro“: – en *vira* poluso – , kaj la viro de tiu ĉi tero ankoraŭ povas malkovri la saman spuron de sia iama unuiĝo kun la „virino“: – kun *virina* poluso – ...

Ĉia anima strebado al unuiĝo inter viro kaj virino sur tiu ĉi tero estas bazita nur sur tio, kio tiumaniere en la viro ankoraŭ scias pri la virino, kaj en la virino pri la viro.–

Eĉ la enorma potenco de la animalkorpa *seksa* altiro inter difinitaj individuoj de ambaŭ seksoj *ne* povus efektiviĝi en la homo de la tero, se la ĉirilataj *animaj* rezistoj ne estus preskaŭ plene *ekskluditaj* fare de anima „memoro“, – lasta malforta sentado, – de la iama dupolusa *unuiĝo*. –

Neniu anima *„kompreniĝado“* inter viro kaj virino en la tera korpo estus ebla sen tio, kio en la *virino* plue efikas el ŝia iama unuiĝo kun la *viro*, – kaj sen tio, kio en la viro konserviĝis kiel efikoj de la *virina* poluso pasintece unuigita kun li. – –

Ne ĉiuj „homoj“ de *spirita* fenomena formo malvenke spertis la „falon“: – la *disduigon*.

De la *ne-disduigitoj, la nefalintoj*, vivantaj en la *spirita* regiono de la tero, ĉiam denove eliras la arda, amogvidata volo savi, kiu havas nur unu celon: – rekonduki en ilian spiritan prastaton la homojn, kiuj falis en la *fizik-sense* percepteblan mondon.

Estas tiuj ne-disduigitoj, kaj *sole nur ili*, kiuj kreas al si sur la tero, el tiuj devontigintaj sin antaŭ sia naskiĝo, la „vekiĝintojn“, kiujn oni nomas majstroj de kosma ekkonado.

Tiuj nefalintoj elektas per senerara elekto el la tera homaro tiujn virojn, en kiuj ili rekonas la spiritan estaĵon, kiu iam devontigis sin al ili: – tiujn virojn, kiuj nun povas fariĝi al ili „filoj“ kaj „fratoj“, – kaj perfektigante faras ilin „lumantoj“ de la eterneco.

Tiuj nevideblaj, dupolusaj homoj de *spirita* fenomena formo vivas – kiel mi jam antaŭe diris – en la *spirita regiono de tiu ĉi tero* sub la alta, amoplena gvidado de unu el la prageneritaj *spirito-„homoj“*, – unu el la *plej altaj* altuloj, kiuj ĉiam restas en la *pura spirito*, kaj *neniam* ha-

vas la volon plue generi sin, eĉ ne en *spiritajn* fenomenajn mondojn. –

Laŭ eterna spirita leĝo nur la *vira* poluso de la spirita homo tie ĉi surtere spertanta sin en animaleca korpo estas ankoraŭ kapabla eniri *konscie* en la *spiritan* regionon de la tero, en kiu la *„ne-disduigitoj“* vivas kiel helpantoj de la tera homo.

Tial neniam *virino* de la tero – enkorpiĝo de la *virina* poluso de spirita homo, – povus esti farata majstro de kosma ekkonado, kaj same estas neeble, ke vera majstro povus fari virinon per spirita transmeto sian alprenitan „filon“ en la spirito, aŭ doni al ŝi veran inicadon, ĉar ĉiuj ĉi formoj de spiriteco *aktiva*, en si rondigita kaj tute nedependa de ĉiu arbitro, antaŭkondiĉas la *aktivan* spiritan poluson en la tera homo.

La „virino“, kiel *apartigita*, pasiva, virina poluso de la *spirita* fenomena homo, nun devas porti en sia surtera ekzisto la sekvojn de *sia voloimpulso al enkorpiĝo en la fizika mondo*, kiu necese okazigis la *disigon* de la polusoj „vira kaj virina“.

Ankaŭ la surtere enkarniĝinta *virina* poluso de la spirita homo povas *esti levata* dum ĝia surtera vivo en la spiritan regionon de la tero, – sed nur en la *pasiva* maniero konforma al ĝia naturo, *sen* tio, ke ĝi akiras *konscion* en tiu regiono, kio tamen tute ne ekskludas la ricevadon de spiritaj virpolusaj influoj.

Sed la *viro* sur tiu ĉi tero, – la enkarniĝo de *vira* spirita poluso, – konservas sian *aktivan* spiritan forton ankaŭ en

la *animaleca* korpo, kvankam ĝi povas esti malligata el sia latenteco – ĉu plene, ĉu parte – nur en la plej maloftaj okazoj, kiuj jam estis menciataj.

Sed tiu malligo estas farebla nur de la malligantaj helpantoj, la ne-disduigitoj en la *spirita regiono* de la tero, kiu regiono tiam fariĝas aktive spertebla al la virpolusa spirito *en plene vekiĝinta* aŭ almenaŭ *parte* perceptokapabla konscio.–

Sed ĉar ankaŭ la aktiva, virpolusa spirito, – malgraŭ la *plena, parta* aŭ *portempa* vekiĝo rezultanta el la malligo farata de la helpantoj, – tie ne povus esti konscia sen la ĉeesto de *virina* poluseco, tial el la alta regiono de neformita eterna spirito, el la „pralumo“, kiu estas „viro“ kaj „virino“, eniras en ĝin radio de *virin*polusa speco, kunfandiĝas kun ĝia „mi“, kaj donas al ĝi la necesan spiritan perfektecon.

Mi ne kredas, ke *ne* sciis pri tiu proceso la poeto, kiu eldiris la vorton:

„L'*eterne* virina *tiras nin sor.“*

Kvankam tio eterne *vira* povas *levi* la virinpolusan spiriton en spiritajn regionojn, tamen *ne* estas eble, ke ŝi tie fariĝas *konscia* dum la tempo de sia surtera enkorpiĝo.

Per la *voloago de strebado al la fiziksense perceptebla fenomena mondo* kaj la rezultanta inversigo de ĝia spirite donita *pasiva* naturo en plej puran *aktivecon*, la virina poluso de la spirita homo fordonis mem la forton, kiu estus povinta reliberigi ĝin el la alstrebita perceptomaniero.

La forto paralizita per tiu voloago ne estas renovigebla dum la surtera vivo.

Sed tiuj, kiuj al la ne-disduigitoj de la *spirita* regiono de la tero fariĝis „pontokonstruantoj“ kaj majstroj de kosma ekkonado, volas malligi kaj la *viron* kaj la *virinon* el tera servuteco...

Ili povas fari tion, tuj kiam ili sukcesis movi la teran homon, ĉu virino aŭ viro, ke li penu plene unuigi siajn animoelementojn kun sia *spirita* „mi“.

Nur tiam la „vivanta Dio“ povas denove „naski“ sin en la homo de la tero. –

Nur tiam estas starigata la „ĉiela eskalo“ sur kiu „la anĝeloj“ iras supren kaj malsupren, kaj kiu etendiĝas de tiu ĉi tero ĝis alte en la eterna „pralumo“, el kiu originas *tio spirita* de la tera homo.

La vojoj montrataj de mi estas fermitaj nek al la virino nek al la viro.

Krome mi parolas ankaŭ pri vojo, kiun iri estas *kelkfoje* ordonate al *viro*, sed *neniam* al *virino*.

Mi parolas pri aktiva, konscia enirado en la spiritan regionon de nia tero *dum* la terhoma ekzistado, kiel pri *ebleco* prezentata nur malofte al viro.

Al la *virino* – al *ĉiu* virino sur tiu ĉi tero, kiu sciante aŭ nur malklare sentante iras vojojn similajn al tiuj montrataj de mi – estos donata, *post* bone utiligita surtera vivo, la forto por *memkonscia* leviĝo en la spiritan mondon

fare de unu el tiuj majstroj, kiujn tio „eterne virina“ estis „tirinta supren“ en la *spiritan regionon* de la tero jam dum ilia surtera vivo, kaj kiuj eĉ post la morto de sia tera korpo restas proksimaj al la tero, alportante helpon el tiu spirita regiono.

La alta vojo de la virino, kiu vojo ne restas rezervita ekskluzive al la virino, estas do vojo nerekta, sed ĝi, same kiel la rekta vojo atingebla nur por malmultaj viroj, kondukas iam *al la spirita unuiĝo* de „viro“ kaj „virino“, kaj sekve al memkonscia vivo en la *spiritaj* mondoj, kiuj situas *multe pli alte* ol la „transa mondo“, en kiu ĉiu homa spirito – eĉ *sen* ia strebado – sin trovas tuj post la morto de sia tera korpo, *transe* de la perceptomaniero de fizikaj *eksteraj* sensoj.

Sed la virino de la tero serĉus *vane*, se ŝi volus trovi tie ĉi surtere iun el la majstroj de kosma ekkonado, por ke li havigu al ŝi eniron en la mondon de la spirito *jam dum ŝia surtera vivo.*

Ankaŭ tiuj sanktaj virinoj, kiuj servis al la majstro priskribita en la evangelioj, nur *post* plenumita surtera vivo trovis en li la helpanton, kiu povis *malfermi* al ili la regnon de la spirito, post kiam li mem estis forlasinta la teran korpon.

Antaŭe ili ne „rekonis“ lin kaj supozis, ke li estas la „ĝardenisto“ de teraj ĝardenoj...

Estis malmola vorto, kiun tiu majstro de kosma ekkonado parolis eĉ al sia patrino, dirante:

„Kio estas inter mi kaj vi, virino?“

Sed tiu vorto estas parolita de la tera ekstera homo de *ĉiu* homo unuiĝinta kun la spirito kaj aplikiĝas al *ĉiu* virino, kiu tie ĉi *en la surtera vivo* serĉas la helpon, kiun la homo aganta en la regno de la esenca spirito povas doni al ŝi *nur tiam*, kiam li mem forlasis la teran korpon.

„Kaj mi, se mi estos *suprenlevita de sur la tero*, altiros al mi *ĉiujn* homojn.“

La teraj impulsoj de virina sopirado tro ofte kondukis virinajn animojn, serĉantajn sian majstron, sur eraran vojon, kie trompiĝo, rezultanta el drama fendiĝo de la propraj animoelementoj, igis ilin trovi la laŭsupozan „majstron“, kiu estis nur produkto de ilia hipertrofia plastike bildanta fantazio...

Ofte la „virino“ de la tero multe tro forte sopiris en realo al la *„viro“* de la tero, dum ŝi pie kredis strebi renkonte al sia kontraŭpoluso en la eterna *spirito*, ĉu ĝi estis nomata „Krišno“ aŭ „Jesuo“.

Ĉu tiam en plej fervora, arda devoteco la *„amato de la animo“* estas enbrakigata, aŭ ĉu pro soifo je kompato la *vivo kaj sufero* de tiu celita estas kunvivata kaj kunsuferata, – ĉiuokaze temas nur pri febra iluzio, kaŭzita de anima fendiĝo, kiom ajn sublima kaj kortuŝa la ekstera manifestado de tiu iluzio eble estas, kiom ajn la travivado de tiu iluzio skuas la *fizikan korpon*; krome, tiu skuiteco ofte instigas fortojn de la nevidebla *fizika* mondo al kunago, de kiuj oni vere fuĝus for kun hororo, se oni scius pri ilia agado kaj ilia naturo. – –

Nur kiam virino de la tero *liberiĝis* de la tera korpo iam alstrebita, – *post surtera vivo direktita al estonta reatingo de la spirita vivo*, en *spirita* formo kaj kun bone unuigitaj animoelementoj, estante plena de sia „vivanta“ Dio, – – nur tiam ŝi povas atendi, ke povas proksimiĝi al ŝi en *spirita* formo majstro, kiu redonas al ŝi tion, kion ŝi kiel virina poluso de la spirita homo iam devis postlasi tie, kie okazis la paralizado de ŝia forto, tial ke ŝi inversigis la direkton de sia strebado...

Tiam ŝi povos trovi, kun plena certeco, sian spiritan kontraŭpoluson, kun kiu ŝi iam estis unuigita kaj nun formas denove, en eterna unuiĝo, la „kompletan“ spiritan homon, – konscie sentante *sin mem* en sia „mi“ kaj *samtempe*, en la *sama* „mi“, sian *viran* spirithoman kontraŭpoluson.

Sed la samo aplikiĝas al *viro*, escepte se li *ekde sia naskiĝo* jam portis en si – pro sia „anima genealogia heredo“: la animoelementoj el la pratempo, kiuj unuiĝis en li rezulte de lia spirita prezentiĝo kiel helpanto de la lumantoj de l’ pralumo, – la taŭgecon por esti farata majstro de kosma ekkonado, aŭ escepte se li vekiĝis surtere almenaŭ tiagrade, ke estis eble al majstro alpreni lin kiel spiritan „filon“ kaj inici lin *per transmeto* de spirita spertokapablo.

Sed ankaŭ tiu *naskiĝinta* por fariĝi majstro, aŭ tiu *alprenita* kiel spirita „filo“, povas *vere utiligi* la spiritan eblecon donitan al li *nur tiam*, se li fidele kaj neŝanceli-

ĝante ĉiam plenumas tion, kio estas ordonata al li de tiuj spirite instruantaj lin.

La hierarkio de la spirito ne konas arbitron.

„Viro“ kaj „virino“, vivantaj tie ĉi en teraj animalecaj korpoj, staras precize en *tiu* respektiva loko, kiun okupi ili estas *kapablaj*, kaj al ĉiu tera homo doniĝas nur tio, por kio li aŭ ŝi sin mem spirite *kapabligis*. –

Parolante ĉi tie pri la *„vojo de la virino“*, mi ankoraŭ devas sciigi la surteran virinon pri *apartaĵo* de ŝia vojo, ankaŭ sur tiu pado, kiu estas irebla por viro *kaj* virino en la sama maniero.

La *viro*, kiu ekiras sur la „vojon“, sendube proksimiĝos al la celo pli rapide, se lia memteno restas *aktiva*, se li ĉiam volas *„ekkapti“* la celon, al kiu li strebas.

Sed al la virino mi rekomendas la memtenon de *konfidanta sopirado*, – memtenon, kiu la celon *alstrebas*, sed *ne* volas „ekkapti“ ĝin, anstataŭe *pasive* lasas sin konduki al ĝi.

Tiu konsilo originas el praa sperto, kaj se oni ĝin sekvas – ĝuste kompreninte ĝin – la celo povas multe pli facile atingata kaj de la viro kaj de la virino...

La „vojo de la virino“, kiel tiu de la viro, estas vojo returne al la prastato en la *spirita* fenomena mondo, *antaŭ* ol la homo mallevis siajn *spiritajn* sensojn en la *fizikajn* sensojn de la „animalo“ kaj tiumaniere faris ilin nekapablaj plu percepti ion spiritan.

Per la inversigo de sia pradonita pasiva naturo en *aktivan* strebadon, la virina poluso *mem* paralizis, *mem* ĉesigis sian originan forton. –

Kiam temas pri ties regajnado, estas necese readopti libervole la pradonitan strebmanieron.

En la virino kaj en la viro de tiu ĉi tero la „vivanta“ Dio volas naski sin, – jam tie ĉi, dum tiu ĉi surtera vivo!–

La „vojo“, kies diversajn formojn mi montris en la unua libro de tiu ĉi trilogio: en la *„libro pri la vivanta Dio“*, aplikiĝas al ĉiuj homoj de tiu ĉi tero, al *„viro“* kaj al *„virino“*, kaj tio, kion mi diris pri alta spirita gvidado, pri la voĉo de la gvidanto, kaj pri la helpo de la majstroj agantaj en la spirita regiono, ankaŭ aplikiĝas al „virino“ *kaj* „viro“.

Oni ne eraru kaj ne supozu, ke en miaj libroj mi volas montri nur eblecojn de spirita disvolviĝo por apartaj elektitoj, – ekzemple nur la vojon de la „disĉiplo“ kaj spirita „inicito“, aŭ eĉ nur la vojon de la majstro de kosma ekkonado!

Kion mi montras kaj devas montri pri tiuj vojoj – kvazaŭ montrante en foran distancon –, tio ĉiam estas priskribita tiamaniere, ke oni ne povas fali en dubon.

Mi diras sufiĉe ofte, ke *tiuj ĉi* vere tre penigaj vojoj estas ireblaj *ne por multaj*, kaj malfermiĝas nur al tiuj viroj, kiuj estas *naskitaj* por iri ilin...

Tiuĉiloke mi devis paroli pri multaj aferoj, kiuj koncernas viron kaj virinon *komune*, ĉar ne estis montreble

aliamaniere, per kio la vojo de la virino diferencas de la *ne* komuna vojo, kiu estas malfermita nur al la viro, kondiĉe ke li estas *„lumanto“ de la pralumo* aŭ vokita fariĝi *disĉiplo*.

Kvankam *tie ĉi surtere* la vojo de la virino *ne* povas atingi tiun plej altan alton, kiu estas atingebla al viro naskita por fariĝi, jam *dum* sia surtera vivo, unu el la majstroj de plej pura ekkonado, tamen la vojo de la virino kondukas fine al la sama celo: – al konscia estado en la fenomena mondo de la spirito: – al la nova naskiĝo de la *spirita* fenomena homo, kiu estas „viro“ *kaj* „virino“, en plej beata unuiĝo eterne nedisigebla, en komuna dupolusa „mi“-sentado. –

Ĉio spirita, kio estas atingebla por la *viro*, iam fariĝos reatingebla por la *virino per* la viro.

Tiam la *vira* poluso de la spirita homo kuntrenos la *virinan*, same kiel antaŭe la virina poluso kuntrenis la viran en la vivon de *fizik*sensa perceptomaniero...

La vojo de la viro

Post tio, kion mi ĝis nun diris pri la „vojo de la virino“, ŝajnas esti preskaŭ superflue paroli aparte pri la „vojo de la viro“.

En la plej multaj okazoj ne estas esenca diferenco inter la vojo de la viro kaj tiu de la virino, malgraŭ la spirita diferenceco de la du polusoj. Nur la *maniero trairi* la vojon tamen povas esti alia ĉe la viro ol ĉe la virino. –

Se viro kiel „viro“ vidas antaŭ si vojoparton, kiu estas *neniam* malfermita al la surtere enkarniĝinta virino, temas nur pri tiu ekstreme alta pado, kiu fariĝas alirebla sole al tiuj malmultaj *naskitaj* por agi plenkonscie en la regionoj de la spirito jam dum tiu ĉi surtera vivo.

Ĝi estas tiu *lasta, plej alta* parto de la vojo de tiuj malmultaj, sur kiu la aliaj ĉiuokaze ne sekvus ilin, – nek viro nek virino, – eĉ se estus eble al ili dum ili vivas *sur la tero*.

Estus *plej vanta aroganteco*, se viro sur tiu ĉi tero, nur ĉar li estas *„viro“*, kredus havi apartan spiritan *„privilegion“*, kaj eble taksus la virinon kiel spiritan estaĵon pli malalte ol si mem.

Mi intence diras: „kiel *spiritan* estaĵon“, ĉar mi tie ĉi parolas pri la eterna *spirito*, – ne pri la *intelekto* kaj la forto de *pensado*, kiuj estas nur rezultoj de surtera bredado.

En la spirito ne ekzistas diferenco en valoro inter la vira poluso kaj la virina!

Virina pasiveco kaj *vira aktiveco* dekomence ekzistas en la spirita homo *en la samaj potenco kaj forto.*

La malmultaj, kiuj dum sia surtera vivo vere havas spiritan „privilegion“ antaŭ la enkarniĝinta virina poluso de la spirita homo, ĉiutempe sciis pri sia alta devo prezenti al la „virino“ sian *apartan* helpon, ĉar kaŭze de la impulso, origininta el ŝi, al fizika enkorpiĝo, ŝi post la „falo“ eniĝis en *pli malfacilan* situacion ol la viro. –

Neniu el ili iam taksis la virinon *pli malalte* ol la viron, aŭ eĉ *malestimis* la virinan homon.

Eĉ se unu el ili per malmolaj vortoj apartigis sian *teran* rilaton al certa virino de la tero disde sia *spirita* entelekio, – tamen ĉiu el tiuj, kiuj havis la tie ĉi menciitan privilegion *kaj antaŭ viroj kaj antaŭ virinoj*, montris, ke la virino – ankaŭ en tera enkorpiĝo – estas inda je vere *alta, solena respekto*.

En la spirito de ĉiu el tiuj malmultaj, atingintaj perfektecon, ja vivas ekde la momento de perfektiĝo ne nur la *vira* poluso de la spirita homo, sed *unuigita kun ĝi* – kiel substituaĵo al ĝia iam reatingota virina kontraŭpoluso – tiu *virinpolusa* radio de la eterna *pralumo*, kiu kapabligas la viran homan spiriton refariĝi plene konscia en la spiritaj fenomenaj mondoj: – tio *„eterne virina“*. – –

Kiel iam *povus* homo tiuspeca – kvankam en sia tera vivo, en *animaleca* korpo, li prezentas nur la viran animalhoman poluson, – taksi la *virinan* spiriton, kiun li, en sia *spirita naturo*, ja sentas *unuigita* kun sia virpolusa spirito *en la sama „mi“*, *pli malalte* ol la viran spiriton? –

La *„vojo de la viro“ tuj dekomence* postulas de la viro, ekiranta sur ĝin, seriozan sed ankaŭ bone ekzercitan volon kompreni la virinan naturon.

Viro, al kiu *mankas* tiu volo, *neniam* atingos la celon, kiu estus atingebla por li...

La *virino*, kiu retrovis sian *pasivan* naturon, estas multe pli inklina rekoni, *volonte* kaj tre ofte *admirante*, la naturon de la viro.

Kontraŭe, la *aktiva* naturo de la *viro* povas tro facile ĵeti la viron en „megalomanion“, tiel ke li sentas sin instigita vidi en la virino ne plu *„alion“* de *sama* valoro, sed *ion malpli valoran*.

Tie ĉi kuŝas ne malgranda danĝero por kelkaj viroj, kiuj deziras suriri sur la „vojon de la viro“.

Iu aŭ alia *kredas* esti iranta sur sia vojo, kredas esti jam tre „spiritigita“ kaj opinias esti akirita *rajton* rigardi, de sur sia reve imagita trono de supereco, malsupren sur la virinon, tiamaniere mem forprenante de si ĉiun eblecon eniri en la spiriton. –

Sed *tiu* viro, kiu vere *ekkonis*, ke jam dum liaj unuaj paŝoj sur la spirita vojo tiras lin supren *tio spirite virina*, – fluegante, por atingi lin, tra plej altaj spiritaj hierarkioj malsupren al siaj terhomaj spiritaj helpantoj, – tiu estas *protektita* kontraŭ la danĝero rigardi sin pli altvalora ol la virino...

Li donos al la virino tion konforman al la virino, kaj al la viro tion konforman al la viro, – sciante, ke la homo de

la *spiritaj* mondoj povas reestiĝi en daŭranta perfekteco *nur tiam*, kiam tio vira kaj tio virina iam *reunuiĝas* formante unu spiritan entelekion, en kiu li spertas *sin mem kaj sian kontraŭpoluson* en sia propra „mi“. –

Faluso kaj jonio *en unuiĝo* montris al la hindo jam en antikva tempo tiun veron simbole, – dum faluso aŭ lingamo *sola*, kiel la korpa organo de la *viro*, simbolas la forton, kiu faras el *tiu* viro, kiu estas *naskita tiuĉicele*, la iniciton kaj la majstron de kosma ekkonado...

Ankaŭ la *bruligado de vidvinoj* en la antikva Hindujo, kiu origine estis nur la plenumado de la religie difinita volo de la postlasita edzino, estas nur malĝojiga esprimo de spirita veraĵo tradiciita el ankoraŭ multe pli antaŭa tempo kaj poste interpretata en tute distordita formo.

Oni transmetis en la eksteran mondon tion, kio signifis ion *pure spiritan*; ĉar la sorto de ĉiu veraĵo veninta sur la teron estas, ke ĝi povas lumi en sia pureco nur dum mallonga tempo, kaj estas komprenata en plena klareco nur de malmultaj, – ĝis fine ĝi fariĝas „komuna posedaĵo“ en formo tro terece distordita.

Se la „virino“ vere *„resaniĝu“* per la „viro“, kaj la „viro“ per la „virino“, tiam ambaŭ: viro kaj virino, devas peni trovi la vojon supren al la spirito *en anima interkompreniĝo, unuiĝintaj en volado*, same kiel ili iam komune *perdis* la altan spiritan fenomenan mondon.

Oni certe ne dubos, ke el la anima komuneco de strebado al la spirito ne malmulte da lumo verŝiĝos ankaŭ sur

problemoj de la ekstera vivo, kiuj antaŭe ege premis viron kaj virinon kaj ŝajnis al ili preskaŭ nesolveblaj.

Atinginte la celon, kiu estas atingebla jam tie ĉi surtere por *ĉiuj*, kiuj serioze kaj persiste volas atingi ĝin: – *la „vivantan“ Dion en la propra koro*, – viro kaj virino fine estas kuntirataj de la plej altaj fortoj, ĉiutempe trafluantaj la malmultajn homojn uzatajn de la dia *amo* por gvidi supren ĉion, kio sopiras al *lumo* kaj al liberiĝo el la kaosa nokto de malcerta volado.

Kun pli granda certeco ol parolo kaj skribo iam povus, ĉiuj honestaj serĉantoj estas gvidataj el interne de la mondoj de klara lumo; el ĉiuj vivantaj tie ĉi surtere, nur la majstroj de kosma ekkonado estas kapablaj, jam dum sia surtera vivo, eniri en tiujn mondojn konscie, sciante, kaj agante el tiu scio. –

Estonte liberigitaj el tera ligiteco, „viro“ kaj „virino“ estos unuigitaj, kun perfekta konservado de la individua naturo de ambaŭ, – en klare formita diferenceco de du spiritaj estaĵoj, ĉiu en si kompleta, – tamen *unuigitaj en unu sola „mi“*, ĉar en la nove naskita spirita homo la „mi“ de unu „koincidas“ *plene* kun tiu de la alia, kaj ĉiu individua „mi“ sentas la „mi“ de sia kontraŭpoluso kiel sin mem. –

Tio, kio estis *du* kaj *disduigita*, tiel restos interligita tra la eterneco, estante *io tria:* nove unuiĝinta spirita estaĵo konsistanta el „viro“ *kaj* „virino“.

Por povi doni *helpon* kaj *gvidadon*, por ke tiu celo iam estu atingata de *ĉiu viro* kaj *ĉiu virino* post la tagoj de tiu ĉi surtera vivo, – por povi instrui al ili, *kiel* utiligi tiun ĉi ekziston, kiel *eviti* ĉirkaŭvojojn kaj disipadon de forto, – tiucele la majstroj de la amo, la majstroj de kosma ekkonado, estas naskitaj sur tiu ĉi tero.

Ne la *tera* kapablo de ekkonado, kiun tiuj malmultaj posedas, faras ilin taŭgaj por servi al iliaj kunhomoj kiel helpantoj.

Nek „talento“ nek „scio“ faras el ili *tion*, kio ili *estas*.

Ne tera sagaco akirigas al ili la *kapablon rigardi* en spiritan okazadon.

Ilia tuta *„ekkonado“* estas *amanta trapenetrado.* –

Ilia tuta *„scio“* estas certeco originanta el spirita *estado*.

Sole nur ili kapablas trairi *tiun* „vojon de la viro“, kiu kondukas *al plene konscia agado en la mondo de la substanca, pura spirito*, kaj nur *el tiu ĉi spirita regiono* venas la *helpo*, kiun la „lumantoj“ de la pralumo havas por prezenti al la aliaj homoj. – –

La edzeco

La *seksa kuneco* de viro kaj virino sur tiu ĉi tero estas io alia ol la *edzeco*. – –

Kiu ekkonis, kia *mistero* ĉirkaŭas „viron kaj virinon“, mistero etendiĝanta supren en la plej internajn regionojn de la pura spirito, supren en la *pralumon* mem, al tiu estos sankta la „monogamia edzeco“, liganta *unu* viron kun *unu* virino por la daŭro de la surtera vivo.

Bone estas al tiuj, kiuj jam en tiu ĉi surtera vivo trovas en la *edzeco* sian propran, *eternan kontraŭpoluson*, la kontraŭpoluson, kun kiu ili estas iam *unuigotaj* por eterne, fariĝante *unueca estaĵo* en la spirito, tial ke ili *estis* unuigitaj kun ĝi *antaŭ* la „disduiĝo“. –

Al multaj eble doniĝis tiu „fortuno“, sen tio ke ili scias pri ĝi, sed ĝi restas aparta *„fortuno“*, ĉar la vojoj de la disduigitoj tute ne estas tiom paralelaj, ke tiu retrovo povus okazi *tre ofte* tie ĉi sur la tero.

En granda nombro de ĉiuj edzecoj kuniĝas *polusoj*, kiuj *ne* originas el la sama unueca estaĵo.

Sed kiam ili libervole sin interligis por la daŭro de tiu ĉi surtera vivo, ambaŭ portas kosman devon rigardi sian interligitecon *tiel, kvazaŭ ili estus estintaj unuigitaj* antaŭ eternecoj kaj nun estus *ree unuigontaj* sin por eterne, fariĝante unueca spirita estaĵo.

Tie ĉi sur la tero, nur spirite plene „vekiĝintaj“ homoj povas scii kun certeco, ĉu ilia *tera* kontraŭpoluso estas ankaŭ ilia *eterna propra* kontraŭpoluso aŭ ne.

Ĉie en la konfuza implikaĵo de tiu ĉi tero insidas trompo.

Iuj kiuj, leginte miajn vortojn, eble rigardas sin kiel „re-trovitojn“, tamen *ne* estas, kaj aliaj, kies surtere alprenita diferenca maniero de pensado kaj sentado eble inklinigas ilin reciproke senti sin *fremdaj*, tamen estas polusoj de *unu*, iam disduigita spirita entelekio .....

Kiu, ne apartenante al la „vekiĝintoj“ de la spirito, tie ĉi aŭdacus frivole fari decidon?

Tial plej alta kosma devo ordonas agi, en ĉiuj okazoj de libere elektita geedza kuneco, tiamaniere, *kvazaŭ* ambaŭ partoj *estus certaj*, ke ili iam kondukis *unu solan* spiritan vivon, kaj ke ili *trovos* tiun eternan spiritan vivon post sia nova unuiĝo.

Ĉiu ligo inter viro kaj virino estas malaprobinda, se ne ekzistas la konscia intenco konduti tiamaniere.

„Kiom vi faris al unu el ĉi tiuj miaj fratoj la plej malgrandaj, tiom vi faris al mi“, diris iam la majstro, pri kiu parolas la sanktaj libroj. –

Samamaniere oni povas diri: Kion ajn vi faras al via vira aŭ virina kontraŭpoluso tie ĉi en la geedza komuneco de tiu ĉi surtera vivo, tion vi faris *al vi mem*, faris en *ĉiu* okazo al *via* spirita *propra* kontraŭpoluso, indiferente, ĉu vi reale *trovis* ĝin surtere aŭ ne. –

Vi mem spirite *formas* vin en tiu komuna vivo de edzeco sur la tero, kaj ju pli vi sukcesis formi vin mem laŭ la alta maniero, kiun postulas via *eterna* unueca vivo kiel *dupolusa* spirita estaĵo, des pli frue vi povos interŝanĝi la maltrankvilecon de la *disduigita* vivo por la *unuiĝo*, kiu redonos al vi por eterne vian kontraŭpoluson, en kiu *vi mem retrovas* vin. – –

Perdiĝas al vi neniu peno, neniu pacienco kaj neniu memsubigado, kiujn vi devas uzi aŭ praktiki en via edzeco, ĉar ĉion, kion vi tiumaniere venke gajnis de vi mem, vi gajnis *por ĉiam kaj eterne*. – –

En tiu ĉi surtera vivo, *ĉiu* homo povas fariĝi aganto por *aliulo*.

Via konduto al viaj kunhomoj neeviteble estigos *sekvojn*, kaj la sekvoj konformos al via *ago*.

Se vi iam faris al homo *ion malbonan*, vi nek per ruzo nek per memgardeco povos malhelpi, ke okazas *al vi* la *sama* malbono, indiferente, ĉu faros ĝin *tiu* homo, al kiu *vi* ĝin faris, aŭ ĉu aliulo agas anstataŭ li, – indiferente, ĉu la sama *formo* de malbono trafas vin, aŭ ĉu la malbono revenas al vi en *alia* formo. –

Ĉiam ĝi konformas *ekzakte* al la grado de la malbono kiun vi mem kreis.

Tiu, kiu faras ĝin al vi, nur *anstataŭas tiun*, kiun via *ago trafis*, eĉ se tiu ĉi laste menciita homo jam antaŭ longe sincere *pardonis* al vi kaj neniam estus kapabla *venĝi mem* la malbonon...

Pardonon vi povas *ricevi*, sed neniam vi povas fuĝi for de via „karmo“, for de la *sekvoj* de via ago. – –

Eble vi triumfas, ĉar la sekvo ne trafas vin *baldaŭ*, sed ne ĝojkriu tro frue!

Eĉ se jardekoj pasas, vi iam *mem* spertos tion, kion vi igis *aliajn* sperti.

Kaj se ekvilibriga kompensado ne povas okazi dum via *surtera vivo*, vi devos iam sperti ĝin en *alia* formo de ekzisto en tute sama maniero, ĉar tiuĉirilate ne ekzistas eblo eskapi.

Tio, kion mi diris pri malbono farita de vi al aliuloj, aplikiĝas ankaŭ al ĉio *bona*, al ĉiu ama ago kiom ajn kaŝa, per kiu vi ĝojigis aliajn.

La sekvoj ne estas haltigeblaj, kaj ne estas necese, ke vi hodiaŭ konu la homon, kiu iam fariĝos ilia instrumento...

Pli aŭ malpli frue li eniros en vian vivon, kaj li mem ne scios, ke per sia agado, *bona* aŭ *malbona*, li estas nur la plenumanto de la sekvoj de viaj propraj agoj. – –

En la tute sama maniero vi *mem* kreos la sekvojn *por vi mem*, per via konduto al via *tera* kontraŭpoluso, kun kiu vi liberdecide ligis vin en edzeco por la daŭro de tiu ĉi surtera vivo. – –

Sed tiurilate vi sentos la lastan sekvon *nur tiam*, kiam vi *forlasis* la teran korpon, kiam vi strebas supren, en *spirita* formo, al tiu luma alto de *eterna* unuiĝo kun via, iam apartigita de vi spirita kontraŭpoluso, – ĉu ĝi jam estis

ligita kun vi en *edzeco* sur la tero, aŭ ĉu *alia* homa spirito akompanis vin en edzeco tra via surtera ekzistado. –

Kaj se por via tuta *boneco* tie ĉi en via edzeco vi ĉiam spertas nur malbonon, se via bona volo *neniam* trovas komprenemon, vi *tamen* ne estas trompita, ĉar dependas sole de *vi*, kian „karmon“ vi kreas al vi, kaj via tera kontraŭpoluso ne povas rabi al vi eĉ joton de via formo, kiun vi mem kreis. –

La bonon, kiun *vi* faros *al ĝi*, vi faras al via propra *eterna* kontraŭpoluso, kun kiu vi iam kondukos *unuecan spiritan vivon* en eterna unuiĝo, indiferente, ĉu la homo, kun kiu vi estas ligita en *edzeco* surtere, reale *mem* estas tiu kontraŭpoluso de via spirita homo, aŭ ĉu estas ligita al vi en ĝi io spirita, kio nur post jarmiloj povas trovi sian propran veran kontraŭpoluson en la *spirita* ekzistado. – –

„Edzeco“, en la plej alta senco, estas nur la preparado de la disduigita *individua poluso* por la *dupolusa* vivo de la unuigita spirita homo, – „viro“ *kaj* „virino“, – en la eterneco. –

Ne per malkuraĝa *fuĝo* for de la malfacilaĵoj de l' preparado, sed per provado *superi* ilin, vi atingos jam dum la surtera vivo la tie ĉi eblan, plej altan ŝtupon de spirita vivokapablo. –

Nur milde kaj delikate mi tiuĉiloke deziras paroli pri la mistero, kiu vualas ambaŭ kontraŭpolusojn, viron kaj

virinon, ankaŭ en ilia *animaleca* formo, en la *fizika* ekvilibriga kompensado de la polusecoj. –

Kio povas esti kruda volupto kaj senhonta seksavideco de du „homaj animaloj“ – tio ankaŭ povas fariĝi *„ŝlosilo“*, kiu malfermas la plej sekretajn pordojn de la *animo*, kaj kondukas en la *plej altan sanktejon*...

Kiel fajro povas *doni lumon kaj varmon*, sed ankaŭ *detrui* domon kaj posedaĵon, tiel same la fortoj de volupto povas fariĝi *flugilhavaj ĉevaloj antaŭ la venka ĉaro de la spirito*, se vidanta „ĉardirektanto“ scias konduki ilin, – sed ankaŭ povas fariĝi demonoj alportantaj malfeliĉegon.

La unuiĝo de la *fizikaj* polusoj okazu nur en plej alta *spirita* amo, se ĝi *malligu* la altajn spiritajn fortojn, kiuj kaŝiĝas *en la tera korpo* de homaj estaĵoj. – –

Tiam *povas* okazi en tia unuiĝo *„miraklo“*, kiu ĉiam denove tuŝas *la plej altan spiritecon*, kaj kiuj ĝin *spertas*, *kune ekkonscias sin mem* en sferoj de *spirita esto*, kiujn la fantazio de neniu poeto iam kapablas imagi. – – –

Ne estas permesate al mi diri *pli multe* pri tiuj aferoj.

Kiu estas *matura* por iri sur tiu *plej sankta el ĉiuj teraj vojoj* sen danĝero, al tiu eĉ konciza indiko sufiĉas por atingi la altan celon diece transfiguritan.

Sed esploru sin mem ĉiu, kiu legas ĉi tion, ĉu li estas inde preparita por eniri *purakore* en la *plejsanktejon* de la templo de la videbla kosmo, ĉar „profananto de templo“ nenie estas tiom severe kaj terure punata kiom tie ĉi. – – –

Edzeco estas unuiĝo de du *spiritoj* kaj du *korpoj*, – sed en sia korpa ekzistado viro kaj virino posedas spiritan forton, pro kiu eĉ „dioj“ povus envii ilin.

— — — — — — — — — — — — — —

Vi iam estu fariĝonta „tuto“, unuigita kun *alia* „tuto“, sed vi ankoraŭ estas nur *„parto“*. –

Ŝanĝi vin en „tuton“: por tio la magia potenco de la edzeco povas multe helpi al vi, se vi lernas uzi ĝin ...

Certe, la edzeco vere deziras ankaŭ la infanon, sed la infano tute ne signifas la plenumon de la plej alta senco de l' edzeco.

La fakto, ke vi povis generi kaj naski *infanojn*, ne garantias, ke via korpa komuneco estas *edzeco*. – –

Edzeco ekzistas nur tie, kie du individuaj polusoj el la *spirita* fenomena mondo, kiuj surtere estas apartigitaj disde siaj kontraŭpolusoj, denove alstrebas fariĝi *dupolusa unueco*. –

Infano, al kiu vera *edzeco* donis la ekziston, estas plej sekure ŝirmata en ĝi, – sed la senco de la edzeco certe ne konsistas sole en tio, ke ĝi donu al la estonta generacio vivon, korpon kaj nutron, instruon kaj edukadon.

Antaŭ ĉio alia, la edzeco estu progresiga al *tiuj*, kiuj unuiĝis en ĝi.

Via *edzeco* estu farita *pro vi mem*, – sed *la infano* estu por vi: *kreditoro de via ŝuldo al la estonteco*. – – –

La infano

Ĉiuhore homoj estas naskataj sur tiu ĉi tero kaj tamen, hodiaŭ kiel en pratempaj tagoj, la sentema homo tie ĉi staras antaŭ mistero...

Ne aliamaniere ol la *animalo* la nova homo eniras en tiun ĉi ekziston, malligas sin disde la patrina korpo, kiu preparis al ĝi la teran korpon.

Sed eĉ la plej inerta sentado estas por momento skue vekigata, starante antaŭ la eterne nova miraklo, vidante ke estaĵo de la propra speco ekvidas la lumon, kaj aŭdante ĝian unuan krion. – –

Tre baldaŭ la nova ido manifestos sian *propran konscion*, kaj la gepatroj miregante vidas novan *volon*, kiu, kvankam ŝajne origininta el *ili*, volas *nur sin mem*, kiom ajn malsaĝaj ŝajnas la rimedoj, kiujn ĝi uzas por igi sian medion plenumi ĝiajn dezirojn. – –

Fine oni devas ekkoni, ke ili estas la sole *ĝustaj* rimedoj, ĉar ili ĉiam plene konformas al la fortoj, kiujn la nova vivanta estaĵo majstras. –

En ĉiu nova vivjaro tiu volo manifestiĝas en *nova* maniero kaj per *novaj* rimedoj por esti respektata, kaj fine staras antaŭ ni *homo tia kia ni*, kiu ofte igas nin konfesi, ke li mastras *spiritajn fortojn*, kiujn ni *mem* vane provus iam majstri...

La miraklo ne finiĝas, kiam oni *unufoje* rigardas per sia mensa okulo unu eron de tiu mistera ĉeno, kaj ĉiu *no-*

va ciclo de naskiĝoj estigas *novajn* miraklojn, kiuj perpleksas la rigardanton, ĉar li ne povas klarigi al si, kio okazis tie ĉi en bona aŭ malbona rilato. –

La enigmon, kiu demandante rigardas el la okuloj de infano, vi neniam solvos, se vi ne klare ekkonas, ke tie ĉi *io tute nova* renkontas vin. – – –

Vi tro forte serĉas *vin mem* en via infano, tro multe lasas vin delogi per la *korpaj similecoj*, kiujn via okulo trovas; vi krome vidas vin kaj vian naturon en la *talento* aŭ en la *mankoj* de via infano, kaj nun inklinas rilatigi ĉion ĉi al la *spirita estaĵo, kiu en via infano konfidas sin al vi*.–

Certe, la *korpo* de via infano originas el *via sango*, el *viaj ĉeloj*, kaj vi donas al ĝi heredaĵon devenintan de jarcentoj kiel korpan posedaĵon. –

Kun ĝi via infano ricevas kelkajn *fortojn de tiu ĉi tero*, kiujn vi nomas „spiritaj“, ĉar vi ankoraŭ ne scias, *kian abundon da profunde misteraj fortoj kaŝas la tera korpo*, kaj *sole nur ĉi tiuj* fortoj estas portantoj de tiuj ecoj, kiuj ĉiam vin delogas rekoni tro forte *vin mem* en via infano. –

En tiu ĉi tera korpo loĝas io, kio – lernante ludi sur ties plej misteraj fortoj kvazaŭ sur harpo – *ne* estas de ĉi tiu mondo...

Tiu ĉi *„io“* rigardas vin el la okuloj de via infano kaj serĉas en vi la saman „ion“, kio *eble* fariĝis *mastro* en via korpo, sed *plej ofte* estas *subigita* kaj *katenita de la fortoj de l' korpo*. – –

Tiu ĉi *„io“* estas *la homo de la pura spirito*, kiu tie ĉi *unuigas* sin kun la tera homanimalo de la tero, kiu estas unu el la *plej malaltaj* fenomenaj formoj de homanimalo en la universo, kaj tiu spirita homo atingas „liberiĝon“ nur, se li venkas ĉi tiun „animalon“.

Li *ne* estas al via infano heredaĵo, kiun ĝi ŝuldas *al vi*, kiom ajn ĝi eble ŝuldas al vi rilate al la heredita formiĝo de siaj cerebraj giroj.

Li originas el la *sama alta regiono* kiel la spirita homo en *vi*, pri kiu vi eble ankoraŭ neniam ekkonis ke li estas *vi mem*, kaj kiun vi eble tiom *perfortis* per la fortoj de via korpo, ke vi ne plu sentas eĉ la plej etan spuron de lia ekzisto, kaj ke vi opinias *vin mem identa kun la subtilaj korpofortoj*, kiuj en la maĵorio de la teraj homoj anstataŭis ilian *spiritan* konscion. –

El la okulo de via infano li esplorante rigardas al vi en la vizaĝon, kvankam tiu okulo ankoraŭ ne fariĝis al li plene mastrita instrumento, kaj serĉas, ĉu li povas trovi iun de sia speco *nekatenitan* sur tiu ĉi tero...

Vi havas plenan kaŭzon por senti *solenan respekton* al via propra infano, se la *spirita homo* en *vi* ne estas *suverena mastro de viaj subtilaj korpofortoj*, ĉar el la okulo de via infano li rigardas vin *en sia origina pureco*. –

Lia sorto nun kuŝas en *via* mano. – – –

Dependas preskaŭ nur de *vi*, ĉu tiu ĉi spirita homo, – kiu, krom se temas pri unu el la maloftaj esceptoj menciitaj aliloke, ankoraŭ *neniam vivis sur tiu ĉi tero*, kiu *neniam revenos*, kaj kiu en ĉiu nova homo manifestiĝas kiel

unika entelekio, – povas en via infano lerni libere mastri *tion*, kion vi donis al li kiel *korpan heredaĵon*. –

Se vi estas tiom absorbita de *vi mem* kaj de via naturo, ke vi volas vidi *en via infano* nur *vin mem* kaj *vian parencaron*, tiam vi apenaŭ procedos tiamaniere, ke la spirita homo, kiu *konfidis* sin al vi, fariĝas mastro de ĉio, kion li lernu mastri...

Sed laŭ kosmaj leĝoj vi *neniam* havas la rajton fari el via infano nur *la spegulon de vi mem*, ĉar *tio plej sankta* kaj *plej alta*, kio manifestiĝas en tiu estaĵo, estas *altege supera* al *ĉio* alta, kion *vi* donis al ĝi kiel korpan heredaĵon...

Krome, ambaŭ estas ligitaj per *animoelementoj* el fora pratempo, kiuj ne atingis *plenan disvolviĝon* kaj nun en via infano postulas *efikadon*. – – –

Ankaŭ *tiujn* fortojn *ne vi* donis al via infano kiel heredaĵon.

La homojn, kiuj *tiurilate* estas *„prauloj“* de via infano, vi povos ekvidi nur tiam, kiam en vi la spirita homo regas tiom suverene, ke li fariĝis *konscie identa kun vi* kaj instruis vin „vidi“ tion, kion neniu tera okulo vidas. – –

Vi *ne havas la rajton* atribui la animofortojn de via infano, kiuj eble ampleksas altajn talentojn, al la *heredaĵo originanta el via sango*. – Vi *ne havas la rajton limigi* aŭ eĉ *subjugigi* la *animofortojn* de via infano, se ili *ne* konformas al viaj deziroj. – –

La rajtoj, kiuj laŭ kosmaj leĝoj estas donitaj al vi rilate al via infano, *estas tre limigitaj*.

Vi havas *sole* la rajtojn de domestro, kiun *alta gasto honoras per tio, ke li konfidas sin al ties protekto*, estante en situacio, kiu malhelpas, ke *li mem* povus protekti sin. –

Ĉiu „edukado“ de via infano devas baziĝi sur *tiu ĉi* ekkono, alie vi bonafide agas *malbone*, kvankam vi esperis rezultigi la *plej bonan* efikon.

Sin konfidis al vi *spirita homo*, al kiu vi povis prepari sole la *korpon*: la loĝejon, kiu servu al li sur la tero. –

Li *mem* kunportis siajn trezorojn kaj *ne* prenas ilin de *vi*. – –

Kion li atendas de vi, estas *sole tio*, ke vi donu al li *protekton* kaj *nutron*, kaj ke vi ebligu al li akiri en la domo, kiun vi donis al li, *la servantojn* bezonatajn de li por praktiki sian regadon sur tiu ĉi tero. – – –

Mi bone scias: tiuj ĉi vortoj estos malagrablaj al multaj, kiuj koncedas al si preskaŭ *„rajton pri vivo kaj morto“* de sia infano. –

Ankaŭ kelkaj el tiuj homoj, kiuj sin dediĉas al la „edukado“, ĵetos tiun ĉi libron flanken, estante plenaj de „justa kolero“. –

Ili konsideru, ke mi tre bone scias, ke tiu infano, kiun ili devas „eduki“ kaj edukante instrui, plej ofte jam estas *tute negative influita* de la „rigora disciplinado fare de la gepatroj“. – – –

Tie ĉi mi parolas *precipe* al *tiuj*, kiuj donis al la infano *sangon kaj vivon*, kaj mi parolas pri tiu infano, kiu ankoraŭ ne estas *trompita pri sia pradonita rajto* per malĝusta interpretado de la „gepatraj rajtoj“, kaj kiu *ankoraŭ ne faras la venĝon*, kiun ĉiu infano neeviteble *devas* fari por sin defendi, tuj kiam, per la kulpo de siaj gepatroj, *la spirita homo en ĝi estas malliberigata*, kaj ĝiaj *animofortoj estas katene ligata en la servuton de la sanga heredaĵo*.

Via infano povas esti al vi *saĝa instruanto*, se vi scias *atenti* pri tio, kiel *la pura spirita homo* en ĝi *ĉiam* volas penetri tra ĉiuj korpaj vualoj, kiujn *vi* donis al ĝi. – –

Via infano povas esti multe *pli aĝa* ol vi mem, danke al tiuj animoelementoj el la fora pratempo, kiuj nove unuiĝas en ĝi kaj kiuj volas atingi *daŭran unuiĝon* per homa spirito. –

Vi ne povas atendi, ke via infano vin *honoras*, se ĝi staras *multe pli alte* ol vi...

Ne kredu, ke vi senpune povas devige enigi vian infanon en la spiritajn katenojn al vi akcepteblajn, ĉar ĝi kiel homo ankoraŭ scias nenion pri si kaj pri sia digno! –

En via infano *estas* io, al kio *nenio* restas kaŝita. – –

Multe pli ekzakte, ol kiom vi kredas, estas registrataj de ĝi *ĉiu rigardo* kaj *ĉiu vorto por ĉiam*, kaj eĉ se la infano devas ekstere submeti sin al via volo, vi tamen fine estos *malsupera* al ĝi, se via devigado celas ne nur ĝian *protekton*.

La pli granda forto de *via brako* donas al vi *neniun rajton* direkti estaĵon, al kiu vi *peris* nur la *korpan vivon* en formo difinita per vi, *perforte* for de *ĝia* vojo kaj irigi ĝin sur la vojo de via volo. – – –

En malindulga justeco la leĝo de la spirito fine sukcesos havigi al si respekton. – –

Se vi kulpiĝis, vi devos ne miri, se via kulpo iam riveliĝos, je via amara bedaŭro. –

Ju pli zorge vi atentos la *dian fajreron*, kiu *konfidas* sin al vi en via infano, des pli vi sentos ankaŭ *en vi mem* la dian fajreron kaj eble tiam lernos *vere trovi* ĝin pere de via infano. – – –

Vi tiam sentos, kion *tiu dia homo* volis esprimi per la ofte aŭditaj vortoj, ke ĉiu, kiu volas atingi en si la „regnon de la ĉielo“, devas unue fariĝi kiel „infano“.

— — — — — — — — — — — — — —

Ne pro la *„eduko“*, *mono* kaj *scio* donitaj de vi al via infano ĝi dankos al vi, – nur tio, ke vi *lasis ĝin fariĝi tiu homo*, kiu laŭ sia spirita naturo volis manifestiĝi en ĝi, akirigos al vi ĝian *dankon*. –

En la *sama* familio ofte estas multaj infanoj, kiujn oni senpripense rigardas kvazaŭ kiel plantojn de la sama specio, ĉar *laŭ la sanga heredaĵo* ili estas „gefratoj“; tamen ekzistas inter ili por tiu, kiu povas *„vidi“* per spiritaj okuloj, ofte *pli grandaj* diferencoj ol inter popoloj de *reciproke tute fremdaj rasoj*. – –

Ne nur la manifestiĝo de la *spirita homo* estas *unika* en ĉiu infano kaj *diferencas* de ĉiu *alia* infano de tiu ĉi tera mondo, – ankaŭ la animoelementoj, kiuj koncentriĝas ĉirkaŭ ĉiu tia spirita centro, kvazaŭ kristaloj, en ĉiu infano formas tute novajn formojn, kaj kelkfoje estas jam antaŭformitaj de multaj homaj generacioj. –

En unu infano povas efiki *animoelementoj* iam formitaj de voloimpulso, kiu originis *en homo de malproksima regiono*...

En *alia* infano eble aktivas *animoelementoj*, kies deirpunkto de formado estis homo, kiu vivis dum tempo, *kiam la fundamentoj de la piramidoj ankoraŭ ne estis metitaj*.

Kaj la animoelementoj de *ankoraŭ alia infano* eble estis formataj de homo, kiu iam nelibervole *devis* forlasi la vivon, aŭ mortis *kiel martiro* de sia konvinko...

En la hejmo de *malriĉulo* povas naskiĝi infano, kies animoelementoj trovis formiĝon sur *trono*, kaj en la infano de *riĉulo* povas strebi al disvolviĝo animoelementoj, kiuj iam estis formataj de la impulso de *vagabondo*...

Kaj infanoj *de la sama gepatra paro* povas porti en si *ĉiujn* ĉi formkompleksojn, formitajn el animoelementoj fare de impulsoj de jam longe forgesitaj generacioj, *en ĉiu imagebla nuancaro*...

Ne estos via tasko, *malhelpi* la efikadon de la kompleksoj el animoelementoj, pri kiu vi sentas, ke ili originis

el *malbonaj* impulsoj, eble subpremante ilin per „rigora disciplinado“ aŭ ekstera perforto, ĉar tio, kion vi tiel povus atingi, ĉiam estus *trompiĝo*, eĉ se via infano poste, eble atinginte respektinde altan postenon, laŭekstere forgesigus al vi tion, kion ĝi *tamen* plue portas *en si*. –

Estos via tasko, *direkti* tiujn animofortojn tiumaniere, ke ili jam en frua juneco *trovas* la efikon alstrebatan de ili, sed en la direkto al *tiaj* celoj, kiaj neniam povas *kaŭzi damaĝon al via infano aŭ al aliaj homoj*. – – –

Pli ol unu „familia honto“ estus evitebla, se oni penus, – ekkoninte la *unuajn signojn*, kiuj anoncas ion malagrablan, – *„direkti“* per saĝa pacienco la neĝojigajn animofortojn al vojoj, kiuj *konformas al ilia strebado* kaj *tamen ne estas detruaj*. – – –

Dependas de ĉiu individua okazo, kaj devas esti zorge decidate post sobra konsiderado, kiu *speco* de „direktado al aliaj celoj“ estas rekomendinda.

Sed ne lasu la ŝajnon *trompi* vin!

Instinkto *ne estas neniigita*, se pro timo de puno ĝi ne kuraĝas *eksterigi sin*. – –

Kaj la celo *ne estas neniigi* la nedezirindajn animofortojn, ĉar ĉiu animoforto estas *bona per si mem* kaj povas, direktite al *ĝusta* vojo, rezultigi *plej altan feliĉon* kaj *homan perfektiĝon*. – – –

Tie ĉi mi parolis nur pri *tiuj* formoj de animoelementoj, kiuj rezulte de *malaltaj* impulsoj iam eniris en la mondon de efikoj.

Sed eble ŝajnos al vi *„nedezirindaj“* ankaŭ formoj de animoelementoj, kiuj ŝuldas sian formiĝon al impulso vivinta en alta animo *tre fora de ĉio malbona*, – nur pro tio, ke ili estas *fremdaj al viaj propraj animoelementoj* kaj *malamikaj al la impulsoj* estiĝantaj en vi mem. – –

Vi deziras, ke la formoj de animoelementoj, kiujn vi mem kreas, videble ekefikos ankaŭ en *via infano*, sed vi ekkonas, ke vivas kaj aktivas en tiu infano *io tute alia*. –

Tie ĉi, estas atendata de vi alta kaj saĝa *abnegacio*, kiu ofte postulas de vi *plej pezan oferon*, se vi ne volas fariĝi *krimulo* kontraŭ la animo de via infano. –

Eble vi dum multaj jaroj kreis al vi belajn revojn pri la estonta profesio de via infano, kaj jam detale planis ĝian karieron. –

Sed nun vi devas ekkoni, ke ĉio, kion vi tiel planis kun la plej bona intenco, estas ruinigita kaj detruita de la naturo de via infano, naturo, al kiu vi ne povas rifuzi vian respekton. – –

Nun montriĝos, ĉu *la amo* al via infano *vere* koncernas *la infanon mem*, tiun novan, *unikan* homon, kiu sur tiu ĉi tero lernu vivi nur *sian* vivon, aŭ ĉu, en nekonscia blindeco, vi en via amo vidis *neniam vian infanon*, sed nur *vin mem*...

Eble la decido estas *malfacila*, sed se vi volas procedi *saĝe* kaj *konforme al la eternaj kosmaj leĝoj*, tiam vi *devas* kapabli, por la bono de via *infano*, *forgesi* kaj *enterigi* viajn *dezirojn*. – – –

La naturo faris vin peranto de korpa vivo sur *tiu ĉi* tero, por ke la vero de la *spirita homo* povu manifestiĝi tie ĉi en infinitobla formiĝo, por liberigi sin mem de sia strebado al la profundo.

Vi estu *helpanto* de la naturo, – *helpanto* de la spirita homo, kiu prenis *el via sango* la *korpon de la tero! – –*

Tiumaniere vi plej efike helpos ankaŭ *la spiritan homon en vi mem* „liberigi“ sin. –

Do *viaj propraj infanoj* estos al vi: *gvidantoj al vi mem, – al via „vivanta Dio“, – – al la eterna „vivo“!*

Kaj se estas malfacile al vi kredi min, ke vi donis al via infano nur la *teran korpon*, tiam mi devas memorigi vin pri tio, ke laŭ homa tradicio estas atribuata al la *spirito* multo, kiu havas sian kaŭzon *sole* en *terkorpaj* energioj...

Por la *disvolviĝo* de tiuj heredigeblaj subtilaj fortoj fizikaj, laŭ ĝenerala kutimo nomataj fortoj de la spirito, estas treege grave, ĉu en vi mem la *spirita homo* jam akiris suverenecon, aŭ ĉu vi estas sklavo de via animaleco. –

Tamen temas nur pri *korpaj* fortoj, per kiuj vi povas peri al via infano ĉion, kion ĝi ricevas de vi kiel „dispoziciojn“ kaj „talentojn“. –

Zorgu, ke via infano povu *beni* tiun heredaĵon! – – –

La nova homaro

Tiom longe, kiom sur tiu ĉi tero homoj vivas en iu ajn speco de socia unuiĝo, ekzistos ree kaj ree unuopuloj, kiuj *ne estas kontentaj* pri la *naturo* de la socia vivo liganta ilin kun aliaj, kaj tamen la homoj neniam trovos *perfektan* ŝtatformon. –

Ĉiam ies avantaĝo estos la malavantaĝo de alia, kaj ĉiam nur malmultaj volos *rezigni* pri sia avantaĝo, eĉ se ili vidas, ke ĝi kaŭzas malavantaĝon al aliaj.

Estas neeble, ke sur tiu ĉi tero iam estiĝas *„ŝtato de Dio“*, kiu unuigus *ĉiujn* homojn libere *en amo*, ĉar tiu ĉi tero iam estis sen-di-igata *de la homo mem*, kiam li pro timo antaŭ sia propra potenco perdis la regadon super ĝi.

Kiom ajn ofte oni teorie proklamas *la surteran beatecon de ĉiuj homoj*, la *realo* tamen *ĉiam* neimpresite *mokos* ĉiun teorion. –

En ĉiuj *„respublikoj“* ekzistos *„reĝoj“* kaj *„princoj“*, kaj neniu *„despoto“* povos malhelpi, ke en lia regno troviĝas *regionoj*, kiuj *ĉiam restas ekster liaj potenco kaj arbitro*. – – –

Neniam la *„konsiliĝa kunveno de ĉiuj“* kreos leĝon, kiu superus la saĝajn kaj imponajn leĝojn, kiujn grandaj *„reĝoj“* donis al la mondo.

Ĉiam estos nur *malmultaj*, al kiuj la naturo donacis la talenton kaj forton por *ordigi* la senordan, kaj por *gvidi* tion, kio *negvidate* ne alportas prosperon al si nek al aliaj.

Eĉ pli malofte estos troveblaj tiuj, al kiuj la naturo donacis la rajton *regi*, – regi super ĉio, kio ne povas aŭ ne volas praktiki *memregadon*.

En ĉiuj regnoj de la kosmo, alireblaj ĉu al la *fizikaj*, ĉu al la *spiritaj* sensoj, regas la sistemo de *„hierarkio“*, regas *subordigo* kaj *superordigo*, kaj *ĉiam pli malgranda* fariĝas la *nombro* de agantaj fortoj, ju pli *foren* etendiĝas iliaj potenco kaj efikado. – – –

Ankaŭ la socia vivo de la *tera homo* estas submetita al tiu leĝo, kaj ĉiu *arbitro*, kiu bonintence volas krei *„egalecon“*, estas dekomence *kondamnita de si mem*, – iras la disrevigan vojon, prezentitan de la naturo al ĉiu homa saĝo, kiu ĝian leĝon *ankoraŭ ne ekkonas* aŭ, ekkoninte ĝin, *malatentas*.

En *ĉiu* speco de terhoma socia vivo, hierarkio kaj ŝtupoj povas esti konstruataj konforme al la ordono de la naturo, kaj se oni tion ne *konscie alstrebas*, la naturo *mem* konstruas tion al si konforman sen ia indulgo, kiom ajn granda estos la nombro da *viktimoj* postulataj de la fera leĝo...

Oni povas nenion *ĉirkaŭiri*, nenion atingi *aliamaniere*, kie la ĝenerala, kosma leĝo *ordonas*. –

Sed homo ne fariĝas *„reĝo“* per naskiĝo en reĝa palaco, kaj la tuta saĝo de *filozofo* aspiranta, ke la homoj estu feliĉaj sub lia gvidado, ne faros lin „direktanto de ŝtato“.

La mistika forto, kiu vere kreas *„reĝojn“*, povas *konserviĝi* en dinastia familio dum jarcentoj, sed ĝi devas *estingiĝi*, tuj kiam la *impulsoj*, kiuj *fondis* la „reĝecon“ en ĝi, *trovis* sian *plenan efikon* en agado kaj vivo, kaj neniu armeo en la mondo povas anstataŭigi tion estingiĝintan per *alia* potenco kaj ankoraŭ protekti eksteran „reĝecon“.

Sed ne *ĉiu* „reĝo“, kiun *lia lando perdis*, ĉesis porti la *ermenon de la reĝoj*, – kaj inverse, tiu aŭ alia reĝa trono estis renversata de *malamiko* de „reĝa“ potenco, kiu tute certe ne sciis, ke *li mem* estis „reĝo“, sed kiun *lia lando ne trovis*. – – –

Estas pardoneble, se oni kredas je „disvolviĝo“ en la aferoj de ŝtata formiĝo, ĉar la okulo de l' homo estas tro inklina preni la *plej proksiman medion* por „la mondo“, kaj la homo ankaŭ nur malfacile kapablas rigardi la tempojn, kiujn li povas mense ampleksi, kiel „sekundojn de la eterneco“. – –

La malmultaj sur tiu ĉi tero, kiuj kapablas rigardi tra *pli vasta* vidkampo en spaco kaj tempo, devas – malgraŭ ĉiuj ŝajnaj kontraŭargumentoj, – diri al si, ke ĉio, kion la tera homo opinias *„evolua disvolviĝo“* rilate al „ŝtata ordo“, estas pura *trompiĝo*, kaj ke *ankoraŭ post jarmiloj la homaro verŝos sian sangon en la samaj bataloj pro la superregado de iuj aŭ aliaj*, kiel *hodiaŭ* aŭ *antaŭ miloj da jaroj*, kiam pereis kulturoj, kies spurojn ĝis nun neniu esploristo *elfosis*...

Jen „la *popolo*“ subfalos al la eraro, ke ĝi povas esti *„reganto“* kaj *regi sin mem*, la *„reganton“*, – jen *reĝoj*, en kiuj troviĝas *neniom* da *vera „reĝeco“ kaj de ties mistika potenco*, volas sekurigi per *bataliloj* la tronon, pri kiu ili *ne havas rajton*; kaj ĉiam denove la sortoj ŝanĝiĝos, ĝis fine la lastaj homoj de tiu ĉi tero reciproke sin batmortigas, – krom se spirita ekkono ankoraŭ malhelpas ilin fari tion, – tial ke la lasta animalo estas buĉita kaj la lasta planto antaŭ longe mortis en sablo kaj glacio, ĉar tiu ĉi tero devas glaciiĝi, kaj la *eterna* „liberiĝo“ de la tera homo okazos nur *en nova kosma eono*. – –

Ve al la „lastaj homoj“, ĉar tiam la legendo pri Kain kaj Habel ripetiĝos *miloble*, se la tera homo ne antaŭe rememoras, ke ĉiu homo estas spirita estaĵo, kiu volas trovi sian spiritan ekziston ankaŭ en sia proksimulo. –

Ĉiu el la malmultaj, al kiuj la spirito kaj transmeto de spirita ekkono heligis per klara lumo la vastojn de tempo kaj spaco, havas la saman deziron kiel mi: – ke nur *unu* el tiuj, kiuj hodiaŭ kaj estonte esperas krei daŭran feliĉon al tiu ĉi tera mondo, fariĝu kapabla vidi *tion*, kion ni malmultaj, preskaŭ estingitaj de sufero pro aliaj, *devas* lerni klare vidi! –

Certe teruro paralizus lin, kaj, profunde hontante en sia koro, li sendus siajn revojn pri la estonteco en la plej profundan ŝakton de sia animo, neniam plu serĉus *sur tiu ĉi tero* tion, kion lia *spirito* montras al li, kaj kion li, kate-

nite en eraro, opinias realigebla sur tiu ĉi kosma polvero, la „tero“.

La revoj de tiuj feliĉigantoj de la mondo *tamen* estas plenaj de vero, sed la *feliĉo*, kiun ili deziras al la homaro, estas neniam atingebla *surtere*, neniam realigebla per teraj rimedoj, neniam rezervita *al la surtera homo tia, kian ili reve imagas al si*. – –

Ni do serĉu *alian* „novan homaron“, homaron, kiu, kvankam loĝanta *sur la tero* kaj ĝojanta pro tiu ĉi surtera vivo kiom estas eble, jam de longe estas ne plu *sole* „de ĉi tiu tero“! –

Ni devas konduki la homon al *pli profunda fonto* de feliĉo, fonto kies elfluaĵo estas *pli abunda*, se ni volas ekstari vere *fratece* ĉe la flanko de tiuj „amikoj de la homaro“ ensorĉitaj *de la revo pri tera feliĉo*. –

Ni devas liberigi ilin disde *ili mem* kaj iliaj *revoj*, se ni *vere utiligu* al la homaro la *veron*, kiun ili obtuze *sentas*, sed tiam reduktas al sterilaj pensokonstruaĵoj. – –

Kvankam *ne* estas eble, ke vere justa homo iam povus krei *justecon por ĉiuj*, tamen ĉiu *unuopulo* povas strebi al *honesteco* kaj *laŭleĝeco*, tiel helpante kompensi la *volon al kontraŭleĝeco*, kiun eĉ diaj fortoj neniam povas forigi el tiu ĉi tera vivo. – – –

„La feliĉo de la homaro“ estas feliĉo de l’ *individuo* kaj atingebla sole nur en la *animo* de ĉiu unuopa homo. –

La „nova homaro“, kiu iam povas estiĝi sur tiu ĉi tero, tute certe *ne* plu atendos sian feliĉon *de ekstere*. – Ĝi ekkonos, ke la aferoj de la ekstera mondo estas nur tio, *kion ni faras el ili*, kaj ke ili povas *decidige influi* nin nur en tiu grado, en kiu ni *lasas* nin influi...

La *interna* mondo de la *unuopulo* devas fariĝi mondo de la *paco* kaj de la *pura feliĉo*, kaj *sole tie ĉi* la homo de la tero povas renkonti *veran feliĉon*. – – –

Kiel la feliĉo de l' unuopulo povas esti *trovata*, tion montras la instruo prezentita en ĉi tiuj libroj.

Ke la sekvado de iliaj konsiloj povas multe plifeliĉigi ankaŭ la vivon en la *ekstera mondo*, certe neos neniu, kiu ekkonis, ke la tuta vivo de tiu ĉi ekstera mondo estas nur atesto de la efikado de *nevideblaj* fortoj. – –

De *interne* devas ĝermi ĉio, kio en la tera, ekstera vivo alportu veran feliĉigon. –

En la *ekstero* estas nur la regno de efikado de tiuj fortoj, kiuj estas ankritaj sole *plej profunde en la animo.*

Kiu volas plibonigi tie ĉi en la *ekstero*, tiu rikoltos nur *ŝajnan sukceson*, alportos feliĉigon nur *momentan*, kaj tio de li farita devas tre baldaŭ disfali, ĉar mankas la *radikofortoj*, kiuj povus *konservi* ĝin en la ekstera mondo. – –

Tiu ĉi „libro pri la homo“ malfermu la okulojn al multaj, kiuj, plenaj de plej bona strebado, hodiaŭ ankoraŭ disipas siajn fortojn, ĉar ili esperas atingi la „feliĉon de la homaro“ en la ekstera mondo.

Tiuj, kiuj hodiaŭ de matene ĝis vespere rigardas *eksteren* por trovi savon kaj helpon, prefere rigardu *internen*.

Nur se oni rigardas *internen anstataŭ eksteren*, la vivo de la homaro povas fariĝi *konforma al la homa digno* ankaŭ en la *ekstera* mondo. – – –

Nur tiam iu aŭ alia el la „revoj pri la estonteco“ povas fariĝi *plenumebla*, revo, kiu per la rimedoj ĝis hodiaŭ volonte uzataj riskas *dissolviĝi* en vaporon kaj nebulon.

La homoj de la *„malnova homaro“* bone sukcesis devige meti la *eksteran mondon* en sian *servon*, sed ĉar ili povas „devigi“ ĝin nur de *ekstere*, ili minacas subfali al la fortoj, kiujn ili mem malkatenis por servigado.

La *„nova* homaro“ ne plu volos *devigi de ekstere* tion, kion ĝi lernos *direkti* multe pli prosperige *de interne*. – –

En ĉiu unuopulo de la „nova homaro“ riveliĝos *fortoj*, kiuj eklipsas *ĉion*, kion la homo de la *„malnova* homaro“ fiere admiris kiel „spiritan atingitaĵon“, – ne konsciante en sia interno, ke ĉiu *pensado* neniam povas ekkapti la *„spiriton“*, kiu, *agante kiel la forto de l' fulmo*, plenigas la kosmon, kaj kiu estas servigebla al la homo *neniam* per pensado, *neniam* per ekstera mekanismo, mokante la mokon, kiun la „spirito“ de kelkaj „pensistoj“ kontraŭmetas al ĝia *realo*. – – –

Estante tro fora de ĉiu iluzio, mi scias kun certeco, ke la *reala* spirito nek hodiaŭ nek morgaŭ povas ĉiuloke revelacii sin, ĉar sisteme la malnova homaro ŝute plenigis

ĉiun ŝakton, tra kiu la homo de la nuna tempo povus trovi en si la profundon, en kiu murmuras la fontoj de ĉiu estiĝado.

Sed iam tiuj fontoj *denove* malfermiĝos, kaj tiuj, kiuj tiam *povas* ĉerpi el ili, kapablos fari per la forto de la vera spirito ne malmulton, kiu hodiaŭ estas *vane* alstrebata per la tuta pensada forto de la cerboj.

Sed eĉ *tiam* tiu ĉi tero ne fariĝos „ĉielo“, kaj nemastritaj fortoj ĉiam tenos la *maĵorion* de la homoj en katenoj.–

La *„nova homaro“* estos regno de *elektitoj* kaj *vokitoj*, kaj *unuopaj* homoj jam *hodiaŭ* estas fondantaj en si tiun regnon.

Sed estas *eble*, ke tiu ĉi generacio spertas ĝiajn unuajn spurojn, – sed *certe la infanoj de niaj infanoj scios* pri ĝiaj fortoj, same kiel hodiaŭ *ni* konas la fortojn, kiujn la homo de la *malnova* homaro kredis esti elŝirinta al la naturo, ĉar li sciis servigi ilin al si ruze, *de ekstere*.

Sed la sanktaj libroj de antikva tempo prave anoncas regnon de la „filoj de la *lumo*“, kaj regnon de la „filoj de *ĉi tiu mondo“* de neekvilibrigeblaj eksteraj fortoj, kaj unu, kiu vere povis scii tion, diris: „La filoj de ĉi tiu mondo estas en sia generacio *pli prudentaj*, ol la filoj de la lumo.“

Estus dezirinde, ke ankaŭ la „filoj de la *lumo*“ fariĝus en *sia* generacio *„pli prudentaj“* kaj scius *rompi* la fortan influon, per kiu ili estas katenitaj de la „filoj de *ĉi tiu mondo“*.

Epilogo

Ni nun vidis la *homon* sur ĉiuj liaj vojoj.

Ni vidis lin en lia *origino*, kiam li ankoraŭ vivis en *dieco*, kaj vidis lian „falon“ el alta lumado.

Ni vidis, kiel li unuigis sin al la animalo kaj nun, en sia memkreita ekzilo, penas reatingi la feliĉon de la origino.

Ni akompanis lin sur vojoj de *eraro* kaj sur la vojo al la *vero*, kaj tiel ekkonis, ke tiu ĉi tero *ne povas* fariĝi la hejmlando de l' homo, kaj ke estis vero tio, kion scianto iam diris: – –

„Ĉar la fervora sopiro de la kreitaro atendas la malkaŝon de la filoj de Dio.“

Vi mem, al kiu mi tie ĉi parolas, – *vi mem* estas *homo* kaj povas fariĝi „plenumanto de la sopiro de la kreitaro“, „filo aŭ filino de *Dio“*, „filo aŭ filino de la *lumo“*. –

Sed vi povas ankaŭ, se sufiĉas al vi, trovi vian malabundan ĝojon kiel „filo aŭ filino de *tiu ĉi mondo“*, kiel katenito de la eksteraj aferoj.

Sole nur *vi* povas tiurilate fari decidon, kaj nenio povas esti obstaklo al via volo, tuj kiam vi mem *faris la decidon*.

Sed eble ĝuste tiu *decido* estas tiom amare malfacila por vi.

Vi *deziras* strebi al la plej alta celo, sed vi ankoraŭ ne *volas*...

Se vi *povus* voli, la beateco de volanto tiregus vin kun via ĝoja krio el ĉiuj duboj. –

Treege pekis kontraŭ vi tiuj, kiuj priskribis al vi la vojon al la *lumo* kiel vojon de konstanta *abnegacio* kaj de *rezignado*, tiumaniere paralizante per teruro vian volon kaj katenante ĝin al la tero.

Vi ekkonas el miaj vortoj, ke oni konsilis vin malĝuste, kaj ke via vojo al la lumo neniam malhelpas vin pluki al vi la florojn kaj delikatajn fruktojn je la rando de l' vojo.

Vi eĉ lernos vere *ami* la vivon de tiu ĉi tero nur *tiam*, kiam vi scias, ke vi estas *sur via vojo al la lumo*. – – –

Via vojo al la lumo estas via vojo al *vi mem*, kaj – al via *Dio*, kiu sin *vualas* en vi.

Estas la *„vivanta"* Dio, pri kiu mi parolas, ne la „dio" de iuj idolservantoj.

La „vivanta Dio" lasas sin trovi tre facile, se vi kuraĝe *konfidas* al li *antaŭ ol vi konas lin*, sed li *pli kaj pli malproksimiĝos* de vi, ju pli timeme vi unue postulas *„pruvojn"*, demandante ĉu li vere *estas*, kaj ĉu estas trovebla en vi la forto por proksimiĝi al li...

Ju pli vi tiumaniere malproksimiĝas de li, des pli li forglitos de vi, tiel ke vi fariĝos predo de tiu ekstera mondo, al kiu vi povus *ordoni*, se vi estus *konscie* unuigita kun via Dio. –

Estas nur *ago de la konscio*, kiu donas al vi la ŝlosilon, per kiu vi povas malfermi ĉiujn pordojn kondukantajn al plej sekreta saĝo...

Vi vivas, eĉ en tiu ĉi ekstera vivo, *nur* en *tiu* sfero, kiun via scio pri vi mem *senvualigas* al vi, – kaj multaj, kiuj vivas *en la sama loko*, tamen konscias sin mem *plej diverse* en la *plej diversaj* mondoj de spertado, kiujn ampleksas la regno de la *ekstera mondo*.

Sed vi tiom forte *alligis* vin al la ekzisto de tiuj *eksteraj aferoj*, ke eble ŝajnas al vi preskaŭ „miraklo“, se vi aŭdas pri homo kapabla *konscie eniri* en superan mondon, kies ekziston vi apenaŭ *suspektas*, ĉar via konscio vibras nur en ritmoj *tre diferencaj* de *tiuj* oscilaj ondoj, kiuj rivelas al tiu aliulo la regnon de la supera mondo...

Tio ekstera estas por vi la vera „realo“, kaj nur *malkonfidante* vi turnas vin *al via interna vivo*, pri kiu vi opinias, ke *nur* iluzio kaj fantazio agadas en ĝi.

Ankaŭ *tie ĉi* aplikiĝas tio, kion mi diris antaŭe: –

Vi neniam povas trovi la „realon“ en via interno, se vi ne kuraĝe *konfidas* al ĝi antaŭ ol vi *konas* ĝin...

Vi *pli kaj pli malproksimiĝos* de la realo, ju pli vi timas „trompiĝon“ kaj unue volas ricevi *„pruvojn“*, dum la „pruvo“ prezentiĝos al vi nur kiel *krono* de via kuraĝa strebado.

Vi agas tre prudente, kaj via konscio bone gvidis vin, se en tiu ĉi *ekstera mondo* vi ĉiam volas unue ekhavi

„pruvojn“ antaŭ ol konfidi al ĝi, ĉar la ekstera mondo vere estas mondo de trompo, kaj eĉ la *„pruvoj“*, kiujn ĝi povas doni al vi, *malofte* estas *liberaj* de trompo. –

Vi tiom kutimiĝis *certigi* vin en mondo de konstanta trompado, antaŭ ol vi ekagas, ke vi opinias necesa la saman suspektemon ankaŭ en la mondo de la realo. –

En *via „vero“* kiu per „pruvoj“ fariĝis al vi *netuŝebla*, troviĝas tiom da kruda aŭ subtila *trompo*, ke vi perdis ĉiun mezuron, – kaj kiam vi, direktite sur la spuron de la *vera realo*, trovas la *absolutan* veron, tiam vi timeme forpelas ĝin de vi, ĉar vi kredas esti katenita en vanta trompiĝo, kaj jam de longe estas sklavo de *via* „vero“. – – –

Vi devos unue lerni iri tute novajn vojojn, antaŭ ol vi povas atingi la veron, kia ĝi reale *estas*.

Tie ĉi vere estus necese denove taksi la valoron de ĉiuj valoroj!

Neniam mankos „pensistoj“ kiuj nove *elpensas* al si sian „veron“, kaj se vi kontentiĝas per *elpensita* „vero“, vi facile povos trovi tiun el la multaj formoj, kiu plaĉas al viaj *antaŭjuĝoj* kaj al via *imago* de la ekstera mondo.

Sed se vi volas atingi *la veron mem*, kia ĝi vere *estas*, kaj kiel ĝi radiante *agadas* en eterne nova *realeco*, tiam vi devos serĉi *en vi mem*, kaj nur en via plej profunda *interno* la vero montriĝos al vi *sen vualo*.

Tiam vi klare ekkonos tion, kion tiu ĉi libro volas diri al vi.

Vi tenas en via mano ĝian *novan* formon, en kiu mi provis formuli kelkajn lokojn pli klare, por eviti ĉiun dubon pri tio, kiel vi interpretu miajn vortojn, por ke ili estu beno por vi.

Sed eĉ la plej klara formo de lingvaĵo utilos al vi malmulte, se vi ne strebante penas, en vi mem, levi *vin mem* al luma klareco. –

Kiam *vi mem* fariĝis klara en vi, tiam neniu el miaj vortoj restos „malluma“ al vi, ĉar tio, kion mi konigas al vi, estas „lumo“ *en si mem*, kaj kiu *volas* strebi al la lumo, trovos tie ĉi tion de li serĉatan.

Mi volonte koncedas, ke en tiu ĉi libro mi ofte devas per vortoj esprimi aferojn, *kiuj estas malfacile eksplikeblaj*, kaj ke tiuokaze la vortoj malfermiĝas nur al homo, kiu estas preta *kompreneme senti ilin en si.*

Sed se iu rakontas al vi pri lando, en kiu oni povas elfosi *oron*, vi certe ne tre ĉagreniĝas pro tio, ke li povas nur malfacile priskribi al vi la vojon tien, kiun vi ne konas...

Jen ankaŭ mi priskribas al vi vojon, kiu konduku vin al „lando de oro“!

Certe valoras la penon, ke vi lernas ĝuste interpreti miajn vortojn.

Kaj se ne mankas al vi la kuraĝo por *ĝoje ekiri* la vojon, kiun mi montras al vi, tiam vi vere *trovos en vi mem la plej riĉan landon de oro*, kiun aliulo neniam povas forpreni de vi. – – –

Fina instruo

Kiuj volas helpi unu la alian,
devas esti de l' sama speco.

La fratoj en lumo,
vin konsilantaj,
estas *homoj* kiel vi.
Ne: senemociaj,
neniel eksciteblaj,
mortintaj al la vivo! –

Kion homoj *sopiras*,
estas *sankta* al ili; –
Sed iliaj okuloj
vidas la *finajn* celojn ...

Ĉiu dezirado
en *eraro* kaj *peko*
senvualiĝas al ni
kiel *senvoja* serĉado
de *eterna beleco* ...
– – – – – – – – –
Ni tial preparas
ireblajn padojn.
Ni tial gvidas
sur la vojo al *lumo*, – –

la erarantajn fratojn
komprenante
en *amo*. – – –

Esperanto-tradukoj de pliaj libroj de Bô Yin Râ
estas elŝuteblaj el jena retejo:
boyin-ra.org/esperanto/